

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道 1979 10



# Novaj atingoj de scienca esplorado en Shanghai

Shanghai estas grava bazo de scienca esplorado de Ĉinio. En la lastaj jaroj oni atingis elstarajn sukcesojn en esplorado de lasero, atoma energio, kalkula tekniko, fotoelektra komunikado, infraruĝa teleindukto k.a. novaj teknikoj. Lastatempe sciencistoj de Shanghai plenumis pli ol 1,200 gravajn objektojn de scienca esplorado.


Nun la sciencistoj kaj teknikistoj de Shanghai plenenergie klopodas por atingi kaj superi progresan nivelon de la mondo.

Nove produktita lasera operacia tranĉilo en praktika uzado


Artefarita grandarea glimo













Ekipajo de foto  
lektra komunik  
do en uzado

Komputero kun integra cirkvito uza-  
ta en administrado de entreprenoj

Projektado de nova komputero por entreprenoj








Eksperimenta aparato por studo pri lasera nuklea kunfandiĝo

Nove farita 1024-cifera komputermemorilo de ne-regula enmetado-elprenado

Eksperimentado pri teknologio de fotokonduka fibro



# Fama filmaktoro Zhao Dan




Zhao Dan kaj fama japana aktorino Takamine Hideko

Zhao Dan pentras en sia domo.




Plezura ekskurso kun siaj familianoj





Kun sia satata gitaro



Zhao Dan kun sia edzino Huang Zongying

Zhao Dan pentras sur monto Lushan.



Sceno el la filmo "Li Shizhen"




Sceno el la filmo "Lin Zexu"





Sceno el la filmo "Por la Paco"



Kiam Zhao Dan ludas ĉefrolon en la filmo "Lusin", li interparolas kun Bai Yang, Wang Danfeng kaj aliaj ĉinaj aktoroj.







Zhao Dan en regisorado



# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1979  
N-ro 10  
(253)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio  
Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

Filmaktoro Zhao Dan

### BILDPAĜOJ:

1. KOLORA SERIO

Novaj atingoj de scienca  
esplorado en Shanghai

2. NIGRA-BLANKA SERIO

Fama filmaktoro Zhao Dan

3. KOLORA SERIO

Gulangyu

4. NIGRA-BLANKA SERIO

Nova fizionomio en la mal-  
supra baseno de Huanghe-  
rivero

5. KOLORA SERIO

(1) Pejzaĝo de la vilaĝo  
"Stave" de la komunumo  
"Mettet" de Belgio

(2) Ŝtona kavernaro Yun-  
gang

(3) Ceramikaj skulptaĵoj de  
Shiwan

### SUR LA DORSKOVRILO:

Birdo sur branĉo (ĉinstila pen-  
traĵo)

Atingoj de la nova Ĉinio en la nacia ekonomio . . . . . 2

Shanghai — la plej granda urbo de Ĉinio

Unu tago en Shanghai . . . . . 7

Iom pri la industrio de Shanghai . . . . . 11

Petrola urbo en noktaj horoj . . . . . 14

Pri la libro "Shanghai, Paradizo de Aventuristoj" . . . . . 17

Hejmreveno post 42 jaroj . . . . . 18

Bona zorgado al senhelpaj maljunuloj . . . . . 22

Vinfarado en Yantai . . . . . 24

TRA ĈINIO: Gulangyu, ĝardeno sur maro . . . . . 26

23 jaroj per kaj por Esperanto . . . . . 27

Ŝakisto Qi Jingxuan . . . . . 30

Kiom da infanoj ŝi havas (raportajo) . . . . . 32

AMIKECO: "Mi estas duonĉino" . . . . . 36

EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: La  
Drakboata Festo sur Qingshui-rivero . . . . . 38

HISTORIAJ OBJEKTOJ: "Trezorejo de Ŝtona Skulpturo . . . . . 42

INTER NI: Respondo al ĝelernantoj de Cagliari de Italio . . . . . 46

KURANTAJ AFEROJ . . . . . 48

ESP-NOVAĴOJ . . . . . 51

# ATINGOJ DE LA NOVA ĈINIO EN LA NACIA EKONOMIO

1 9 4 9 — 1 9 7 8

La unua de oktobro de 1979 estas la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En la nova historia periodo, sur la vojo de la nova longa marŝo por modernigi sian landon, la ĉina popolo celebros tiun ĉi feston kun historia signifo. Dum la pasintaj 30 jaroj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la diversnaciecaj popolanoj de nia lando pene luktadis, sin apogante sur propraj fortoj, sur la bazo de la ekstrema malriĉeco kaj postiĝinteco de la duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio. Ili faris grandan batalon por socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, venkis sennombrajn malfacilojn, travivis multajn zigzagojn kaj akiris grandajn sukcesojn en industrio, agrikulturo, kulturo, eduko k. a.

Por helpi niajn legantojn koni la ŝanĝiĝojn de la nova Ĉinio dum la 30 jaroj, ni publikigas aparte en tiu ĉi numero ciferojn kaj grafikaĵojn por montri la atingojn de la nova Ĉinio en disvolvo de la nacia ekonomio. Samtempe ni konigas, per serio da artikoloj, Shanghai, la plej grandan industrian urbon de Ĉinio. Per rakonto en siaj artikoloj pri aferoj viditaj kaj aŭditaj dum sia vizito, niaj raportistoj prezentas, el diversaj anguloj, la hieraŭon kaj hodiaŭon de Shanghai. Krome en tiu ĉi numero aperas la artikolo "Hejmvreveno post 42 Jaroj", kiu priskribas vivecajn scenojn, kiujn iu usona ĉino propraokule vidis en sia hejmlando Ĉinio. Tiu artikolo spegulas faceton de la grandega ŝanĝiĝo de nia kamparo.

Kvankam nia socialisma konstruado akiris grandan progreson post la fondiĝo de la popola respubliko, tamen Ĉinio ankoraŭ estas disvolviĝanta lando kun relative postiĝinta ekonomio. La Tria Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Dua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso faris la gravan decidon turni la ĉefan punkton de laboro sur la socialisman modernigan konstruadon, kaj elmetis la politikon reguligi, reformi, reordigi kaj levi la nacian ekonomion, kio gajnis varman subtenon de ĉiuj partioj kaj diversnaciecaj popolanoj de la lando. Nun la 900-miliona ĉina popolo kun plena memfido kaj per firmaj paŝoj forte strebas por efektiviĝi, antaŭ la fino de tiu ĉi jarcento, la modernigon de industrio, agrikulturo, sciencoj kaj teknikoj kaj nacia defendo kaj por konstrui nian landon en modernan socialisman potencon.

La Red.


















# INDUSTRIO

## TOTALA PRODUKTOVALORO

1949: 100

1978: 3,920




	1949	1978
 Karbo	32,430,000 <i>tunoj</i>	618,000,000 <i>tunoj</i>
 Nafto	121,000 <i>tunoj</i>	104,050,000 <i>tunoj</i>
 Elektro	4,310,000,000 <i>kilovatt-horoj</i>	256,550,000,000 <i>kilovatt-horoj</i>
 Ŝtalo	158,000 <i>tunoj</i>	31,780,000 <i>tunoj</i>
 Gisfero	252,000 <i>tunoj</i>	34,790,000 <i>tunoj</i>
 Cemento	660,000 <i>tunoj</i>	65,240,000 <i>tunoj</i>
 Kemia sterko	6,000 <i>tunoj</i>	8,693,000 <i>tunoj</i>
 Kotonŝpinaĵo	327,000 <i>tunoj</i>	2,380,000 <i>tunoj</i>
 Sukero	199,000 <i>tunoj</i>	2,267,000 <i>tunoj</i>
 Aŭtoj	0	149,100
 Traktoroj	0	113,500
 Kemiaj fibroj	0	284,600 <i>tunoj</i>
 Bicikloj	14,000	8,540,000
 Brakhorloĝoj	0	13,510,000








# AGRIKULTURO

## TOTALA PRODUKTOVALORO

1949: 100

1978: 340



	1949	1978
 Greno	113,200,000 <i>tunoj</i>	304,750,000 <i>tunoj</i>
 Kotonoj	445,000 <i>tunoj</i>	2,167,000 <i>tunoj</i>
 Oledonaj semoj kaj fruktoj	2,328,000 <i>tunoj</i>	4,568,000 <i>tunoj</i>
 Teo	41,000 <i>tunoj</i>	268,000 <i>tunoj</i>
 Porkoj	57,750,000	301,290,000
 Ŝafoj kaj kaproj	42,350,000	169,940,000
 Grandaj dombrutoj	60,020,000	93,750,000

## KOMERCO

Totala valoro de detala vendado



1950 17,060,000,000 *juanoj*

1978 152,750,000,000 *juanoj*

Totala valoro de importoj kaj eksportoj




1950 4,150,000,000 *juanoj*

1978 35,500,000,000 *juanoj*

1949








TRANSPORTADO

1978




22,000 <i>kilometroj</i>	Fervojoj en funkcio 	50,000 <i>kilometroj</i>
81,000 <i>kilometroj</i>	 Ŝoseoj en funkcio	890,000 <i>kilometroj</i>
74,000 <i>kilometroj</i>	Riveraj naviglinioj 	136,000 <i>kilometroj</i>
11,000 <i>kilometroj</i> (1950 j.)	 Civilaj aviadaj linioj	149,000 <i>kilometroj</i>






# KULTURO

	1950	1978
 Kulturaj domoj	1,693	2,700
 Publikaj bibliotekoj	63	1,256
 Eldonkvanto de ĵurnaloj	797,500,000 ekz.	12,776,200,000 ekz.
 Eldonkvanto de gazetoj	35,300,000 ekz.	760,000,000 ekz.
 Eldonkvanto de libroj	274,600,000 ekz.	4,260,000,000 ekz.
 Filmoprojekciaj unuoj	646 (1949 j.)	110,000
 Teatraj trupoj	1,676	3,100

# EDUKADO

	1949	1978
 Altlernejaj studentoj	117,000	850,000
 Mezlernejanoj	1,268,000	66,360,000
 Elementlernejanoj	24,391,000	146,240,000

# HIGIENO


	1949	1978
 Malsanulaj litoj	106,000	1,850,000
 Profesiaj medicinistoj	780,000	2,460,000
 Nudpiedaj kuracistoj		1,600,000

Noto: Hodiaŭ en plejparto de la produktaj brigadoj jam troviĝas nudpiedaj kuracistoj, kaj sukcesoj estas atingitaj de niaj medicinistoj en aplikado de akupunktura anestezo al kraniaj, torakaj kaj abdomenaj operacioj kaj oni ankaŭ multfoje sukcese rekunigis rompitaĵajn membrojn.

## SCIENCO KAJ TEKNOLOGIO

La 16-an de oktobro, 1964, Ĉinio eksplodigis sian unuan atom-bombon. La 17-an de junio, 1976, Ĉinio eksplodigis sian unuan hidrogen-bombon. La 24-an de aprilo, 1970, Ĉinio lanĉis sian unuan artefaritan sateliton. En decembro, 1977, Ĉinio fabrikis integracirkvitan komputeron kun kapacito de 5 milionoj da fojoj de operacio en ĉiu sekundo.

En septembro de 1965, ĉinaj sciencistoj sukcesis artefari insulinon.



## POPOLA VIVO

	1949	1978
<b>Nombro de ŝtataj oficistoj kaj laboristoj</b>	<b>8,004,000</b>	<b>74,510,000</b>
<b>Meznombra salajro de ŝtataj laboruloj</b>	<b>446 juanoj</b>	<b>644 juanoj</b>
<b>Loĝejoj nove konstruitaj</b>	<b>2,510,000 m<sup>2</sup></b>	<b>37,000,000 m<sup>2</sup></b>

Kun disvolviĝo de la nacia ekonomio, ankaŭ la enspezo de la membroj de la popolaj komunumoj kreskas jaron post jaro. Ekzemple, la meznombra enspezo de la komunumanoj en 1978 kreskis je 8.9 juanoj kompare kun tiu en 1977.



# SHANGHAI— LA PLEJ GRANDA URBO DE ĈINIO

TIANSHEN:

## UNU TAGO EN SHANGHAI

**S**HANGHAI (Ŝanhajo) situas ĉe la enfluejo de Changjiang (Jangzi-rivero) kaj okcidente de Huangpu-rivero, kun 10,900,000 loĝantoj, nur malpli multaj ol tiuj de Novjorko kaj Tokio. Ĝi, pli granda ol la ĉefurbo Beijing, havas areon de pli ol 6,100 kvadrataj kilometroj.

Antaŭ la Liberiĝo Shanghai, kiel tipa duonkolonia urbo, estis kromnomata “paradizo de aventuristoj”. En 1949 la urbo estis liberigita kaj la popolo fariĝis mastro. Nun, post malpli ol triono de jarcento, tiu urbo jam fariĝis industria bazo kun relative harmonia disvolviĝo de peza kaj

malpeza industrioj, kun diversspecaj entreprenoj kaj certa teknika nivelo. Samtempe ĝi estas bazo de komercado kaj scienca esploro de nia lando.


Lastatempe, kiel raportistoj, ni faris al Shanghai viziton de pli ol unu monato. Kvankam ni restadis tie nelonge, tamen la vizito impresis nin tre profunde.

### NOVA FIZIONOMIO DE HUANGPU-RIVERO

Iun tagon, akompanate de vojqvidisto, ni aŭte veturis tra la tunelo sub Huangpu-rivero kaj poste vojaĝis per motorboato por rigardi la vigran Shanghai-havenon.

La longa “subrivera koridoro”, kiun konstruis ĉinoj, larĝas 7 metrojn kaj altas 4.4 metrojn. La tunelo estis hele lumigata kaj trapasata de ĉeno kaj ĉeno da aŭtomobiloj. Nia leĝera aŭto veturis ĉirkaŭ 5 minutojn por trairi la tunelon. Poste ni boatis laŭborde. Ni vidis en la rivero multajn ŝipojn venintajn de diversaj landoj. Iuj ŝipoj estis ŝarĝataj, aliaj malŝarĝataj, triaj lante eniris en la havenon, kaj kvaraj estis pretaj ekveturi. Fajfoj de sireno aŭdiĝis tie kaj ĉi tie. Kaj la usona ŝipo “Letitia Lykes” vekis mian atenton. Oni diris al mi, ke tiu ŝipo, ŝarĝita per ĉinaj varoj, estas preta veturi al sia lando. Tiu, kiu pilotis en la stirejo, estis Zhang Derun de Shanghai-haveno. En sia 19-jara marista vivo tiu veterana piloto sekure pilotis sume pli ol 3,000 alilandajn ŝipojn kaj ricevis laŭdojn de diverslandaj ŝipestroj. Post sia pilotado sur “L. Lykes” li emocie rakontis al ni: “Ankaŭ mia patro estis ŝipano. Sed en la malnova socio la rajto de havena administrado kaj pilotado estis ne en niaj manoj, nature, malfeliĉa estis la sorto de la ŝipanoj. Kaj nun ĉiufoje kiam mi suriris fremdlandajn ŝipojn kun hisita ruĝa kvinstela flago atendantajn por

### LA SITUO DE SHANGHAI



1. Shanghai
2. Wuxi
3. Suzhou
4. Hangzhou
5. Taihu-lago
6. Changjiang-rivero
7. Huangpu-rivero

eniri la havenon, mi sentis, ke mi plenumas la sanktan rajton de pilotado en la nomo de la socialisma patrujo, kaj mia koro estis plena de fiereco.”

Shanghai-haveno havas nun 13 ŝarĝejojn kaj plenumas la taskon transporti 62% de la industriaj materialoj kaj produktaĵoj de la tuta urbo. Ĝi ankaŭ transportas varojn al multaj aliaj regionoj de la lando. Ĝi havas komercajn rilatojn kun pli ol 100 amikaj landoj kaj regionoj de la mondo. Ĝia jara ŝarĝkapablo atingas 80,000,000 tunojn, egale al Osaka-haveno de Japanio.

Ni venis al la Kajo de la Dekaj Ŝarĝejoj kun 9 haltejoj por 10,000-tonela ŝipo, ekipitaj per fervojo. Sur la kontenerkajo ses kamionoj povas veturi flanko ĉe flanko. En la malnova socio ŝarĝistoj ŝvitegante transportis lignajn kestojn sur mallarĝa pastabulo. Hodiaŭ la laboro de la ŝarĝistoj estas nur manipuli la aŭtomaton kaj televidan ekipaĵon, kaj miloj kaj miloj da tunoj da karbo mem fluas al difinita loko por transportiĝi per barĝoj aŭ vagonaroj. Ni vizitis tie iujn maljunajn ŝarĝistojn, el kiuj kelkaj fariĝis nun inĝenieroj, ŝipestroj aŭ kadroj administrantaj la havenon.

### SUR NANJING-STRATO


Ni venis al la homoplena loko de komercado — Nanjing-strato kaj pririgardis tie diversajn luksajn magazenojn. Preskaŭ 90 % de la venda-

taj varoj estis produktitaj de Shanghai mem. La varoj estas diversspecaj kaj bonkvalitaj. Iuj butikoj denove komencis vendi siajn tradiciajn varojn. Aliaj aranĝis ekspoziciojn de poliestera-kotonaj bildopresitaj kolorŝtofoj, trikotaĵoj, plektaĵoj kaj modaj vestoj, kio vekis grandan intereson de la urbanoj. Direktoro de iu magazeno ekscitiĝe diris al ni: “Iuj komercaĵoj rapide vendataj en la merkato, ekzemple virinaj malgrandaj brakhorloĝoj, aerpreamaj termosoj, televidiloj kaj kaset-magnetofonoj, estas grandkvante produktataj en Shanghai. La specoj de novaj produktaĵoj ĉi-jare fabrikitaj kaj la ĉiutagaj necesajoj kun plibonigita pakado kaj dekoracio, superis 1,000.”


La nomita direktoro, kiu estis metilernanto en la malnova socio, daŭrigis: “La vendejoj de la antaŭa Nanjing-strato estis plenaj de fremdlandaj varoj, kaj la mastroj ofte vendis malbonkvalitajn varojn kiel bonkvalitajn, kaŝe altigis la prezon, sed trompis la klientojn sub la ŝildo de t.n. ‘granda rabato’, tiel ke la ordinaraĵoj urbanoj suferis domaĝon. Hodiaŭ la maltrankvilo de la popolo pri tio jam malaperis.”

Ni venis en la Unuan Ĉiovendejon de Shanghai, kiu akceptas ĉiutage 100,000 klientojn. Administranto konigis al ni, ke la de ili vendataj komercaĵoj, de silkaj kaptukoj ĝis elektraĵoj instrumentoj kaj ĉiutagaj necesajoj, superis 40,000 specojn. En la kudrejo de la Vestovendejo “Xin-

*En Huangpu-rivero navigas flosanta argano turnebla en 360 gradoj.*



*La Popola Parko*





shang”, kiu estas fama pro sia moda fasono, ni vidis majstrojn lernigi tajladon kaj kudradon. Tiam ili estis okupataj de laŭmezura kudrado de ĉinaj kaj eŭropaj vestoj por grupo da ĉinaj studentoj, kiuj estis pretaj vojaĝi eksterlanden por lerni.


Ni informiĝis, ke ĉiufoje kiam iuj butikoj vendas novajn specojn de teksaĵoj ofte aperas novaj komizoj. Ili estis fakte gvidantoj kaj desegnistoj de fabrikoj, kiuj venis speciale por peti opiniojn de aĉetantoj. Pro siaj belaj bildoj por teksaĵoj ĉijare sume 1188 desegnistoj de la tekstila branĉo de Shanghai estis premiitaj, kaj iuj el ili estis promociitaj al majstroj-desegnistoj.

Tio memorigis nin pri karikaturo de Shanghai-a amatora pentristo: Kelkaj papilioj flirtadas ĉirkaŭ iu virino — ili prenis la florojn presitajn sur ŝia bela ĉemizo por veraj!

## FACILIGI LA TRAFIKADON EN LA URBO

Kun la disvolviĝo de la produktado kaj la plimultiĝo de loĝantoj ankaŭ la trafikado de Shanghai fariĝis pli vigla.

Ĉiutage, kiam leviĝas matenruĝo, ekaperas fluoj da veturiloj sur la ĉefaj stratoj de Shanghai. Ekzemple, ĉe la stacio de la 26-a linio ĉe Waitan (bordstrato laŭlonge de Huangpu-rivero), ni vidis, ke ĉiuminute oni ekspedas unu artikitan trolebuson ruĝe kaj blanke lakitan. La tuta urbo



*Nanjing-strato en nokto*

havas nun sume 190 komunikajn liniojn kun longeco de 3,750 kilometroj, kio donas grandajn oportunojn al la urbanoj.

En la Shanghai-a Kompanio de Publika Trafiko ni intervjuis kamaradon Li Ruidi kun aĝo de 57 jaroj. Li, rikiŝisto multe suferinta en la malnova socio, fariĝis post la Liberiĝo progresinta aŭtobusa kondukto, ĉeestis la tutlandan konferencon de elstaraj laborantoj kaj vojaĝis eksterlanden kiel membro de la laborista delegacio. Li estis transigita nun de la vicesteco de aŭtobusa administracio al la posteno por prizorgi la sekurecon de publika trafiko. Li diris, ke en la malnova socio la Shanghai-aj aŭtobusoj estis posedataj de la fremdlandaj kapitalistoj. Tiam



*En la Shanghai-a Unua Magazeno*



unu aŭtobusa monata bileto kostis 12 juanojn, per kiuj oni ja povis aĉeti 90 kilogramojn da rizo, kaj tian aĉetpovon havis nur la tiamaj ofici-  
cistoj en la fremdlandaj firmaoj. Sed nun ofi-  
cisto aŭ laboristo devas pagi nur 1.5 juanojn por  
sia monata bileto, krom la monhelpo donita de  
la ŝtato.

Kun la plimultiĝo de veturiloj Shanghai, same  
kiel aliaj grandaj urboj de la lando, alprenas ri-  
medojn por garantii la sekurecon de la trafiko  
kaj altigi la efikon de la trafiko. Laŭ statistiko,  
naŭono de la ŝoforoj en la urbo sekure veturigis  
500,000 kilometrojn.

Li Rudi rakontis al ni la jenon: Antaŭ la  
Liberiĝo, somere de 1948, okazis ĉampiona kon-  
kurso de futbalo en Jiangwan-stadiono en la  
antaŭurbo de Shanghai. Post la konkurso leviĝis  
ĥaoso, kaj multaj estis premvunditaj. Post kvar  
horoj oni finis la disportadon de la spektatoroj  
per aŭtomobiloj. Sed nun, post ĉiu matĉo, la  
forportado de pli ol 40,000 spektantoj bezonas  
nur 30 minutojn.

### REALIGITA SKIZO POR URBA KONSTRUADO


En kabineto de la Urbokonstrua Buroo de  
Shanghai, ni vidis realigitan skizon por urba  
konstruado, sur kiu estis registrita la konstruado  
de Shanghai dum la 30 jaroj. Interalie, oni kons-  
truis 140 novajn loĝkvartalojn por laboristoj,  
kun areo de pli ol 16,000,000 kvadrataj metroj,  
kaj preskaŭ 400,000 laboristaj familioj transloĝi-  
ĝis en novajn domojn.

Antaŭ la Liberiĝo, la riĉuloj kaj malriĉuloj en  
Shanghai akre diferencis en loĝkondiĉoj: La bu-  
rokratoj kaj grandkomercistoj loĝis en luksaj  
vilaoj, dum la plejmulto de la laboranta popolo  
vivis en malaltaj subtegmentoj kaj kabanoj. Ni  
vizitis la regionon de Siping-strato, sidejon de la  
antaŭaj domaĉoj de malriĉuloj, kies fizionomio  
tute ŝanĝiĝis antaŭlonge. Nun en tiu regiono  
estis konstruitaj, unu post alia, 6466 novaj la-  
boristaj loĝdomoj kvaretaĝaj aŭ pli altaj.

Iu de la urbokonstrua institucio diris al ni, ke  
tiuj domoj, kvankam dense loĝataj, estas mal-  
kare luigeblaj, kaj ilia luprezto ne superas 4 pro-  
centojn de la enspezoj de laboristoj. Starante sur  
omega tegmento, ni malsuprenrigardis al la  
ĉirkaŭaĵo kaj vidis ombrajn trotuarojn, mezajn  
kaj elementajn lernejojn, hospitalon, vendejojn,  
infangardenojn kaj aliajn establaĵojn. La popolo  
vivas en bona ordo.

En la lastaj jaroj la Shanghai-a popolo starigis  
multajn subterajn konstruaĵojn, el kiuj iujn oni  
uzas por produktado aŭ servigas al popola vivo.  
Ni vizitis subteran ĥirurgian malsanulan ĉam-  
bron de iu laborista hospitalo. La ĉambro havas  
sume 44 malsanulajn litojn. Dum la pasintaj  
kvin jaroj estis akceptitaj tie pli ol 1,500 homoj  
kaj faritaj pli ol 1,200 diversaj operacioj.

Krome la komerca departemento aranĝis sub-  
tere kelkajn hotelojn, magazenojn kaj restora-  
ciojn. Fremdlandaj gastoj kaj elmigrantaj ĉinoj,  
venintaj el diversaj partoj de la mondo, tre vo-  
lontas frandi en la subtera restoracio la famajn  
lokajn pladojn de Ĉinio, ĉar tia restoracio estas  
kvieta kaj komforta.



*Nove konstruitaj  
domblokoj*



# SHANGHAI — LA PLEJ GRANDA URBO DE ĈINIO


TIANSHEN:

## IOM PRI LA INDUSTRIO DE SHANGHAI

**E**N la industria ekspozicio de Shanghai mi rigardis du rimarkindajn ilmaŝinojn. Unu el ili estas alezilo cifere regata por aviadila industrio. Ĝi laboras per 50 malsamaj tranĉiloj aŭtomate alĝustigataj per meĥanikaj manoj en laborado. La alia estas grandtipa frotuma ilmaŝino por precizaj ŝraŭbkaneloj, produktita en Shanghai kaj eksponota en la Internacia Ilmaŝina Ekspozicio okazigota en Milano de Italio en oktobro kurantjare. La tolero en prilaborado de ŝraŭbo longa 5 metrojn per ĝi estas malpli ol kvinono de dikeco de kapharo. Tiuj du ilmaŝinoj markis la nunan teknikan nivelon de la industrio de Shanghai.

Antaŭ la Liberiĝo, Shanghai posedis iom da tekstila kaj maŝinprodukta industrio kun postĝinta teknologio kaj kelkaj prilaboraj entreprenoj ekipitaj kaj provizitaj plejparte per importitaj maŝinoj kaj materialoj. Peza industrio preskaŭ tute ne ekzistis en tiu urbo. Nun, Shanghai jam fariĝis ĝenerala industria bazloko de nia lando. Tio rezultas ĉefe el tio, ke la laboristoj de Shanghai faris al la malnovaj entreprenoj plenan renovigon kaj reformon kaj samtempe establis novajn entreprenojn.

*Ciferregata alezafreza maŝino povanta aŭtomate ŝanĝi tranĉilojn, farita de la Yuejin-a Maŝinfabriko de Shanghai*




### PLI MULTE DA ŜTALO

Kelkaj ŝtalaj kaj feraj fabrikoj de Shanghai sin trovas sur ambaŭ bordoj de la rivero Huangpu. En la malnova Shanghai estis nur kelkaj Martin-fornejoj povantaj produkti nur pli ol 5,000 tunojn da karbona ŝtalo en ĉiu jaro. Sed nun la taga produktokvanto de ŝtalo de la tuta urbo egalas al tiu de tri jaroj en tiu tempo, kaj novaj teknologioj kiel kontinua muldado, vakua afinaĉado kaj uzo de komputero en ekzamenado de la forna temperaturo estas aplikitaj. La nombro de specoj de ŝtalaj materialoj inkluzive de alttemperaturaj alojoj kaj precizaj alojoj atingis 21,000.

Inter la produktaj troviĝas onduma tubo kun diametro de 4.4 metroj, senjunta ŝtaltubo en dikeco de kapilaro, aloja folio malpli dika ol ĵurnalpapero kaj bonkvalitaj ŝtalbendoj uzataj por produkti obturilon de fotoaparato kaj maŝinpecojn de brakhorloĝo. Shanghai ankaŭ liveras ĉiam pli multajn metalaĵojn al aŭtofarado, ŝipfarado, prospektorado, fabrikado de aviadiloj kaj atomenergia industrio.

Mi vizitis la fabrikon de heteroformaj ŝtaltuboj de Shanghai, kiu nun povas produkti pli ol



*En laborejo de la Shanghai-a Ganta Fabriko*

4,400 specojn de diversformaj ŝtaltuboj. Tiu fabriko antaŭe estis tre malgranda kaj havis nur malmulte da simplaj ekipaĵoj. En 1962, la laboristoj elfaris la unuan heteroforman ŝtaltubon dank' al zorga reformo al malnovaj ekipaĵoj. Dum la rigardado ni rimarkis, ke la laboristoj estis muntantaj ĉe tri malsamaj helicaĵaj premiloj instalaĵojn de televida kontrolo por altigi la produktadon.

### KOMENCIĜO DE NULO

En la gastĉambro de la Brakhorloĝa Fabriko de Shanghai ekspozicias brakhorloĝo prove produktita en 1955. Ĝi ne estas belaspekta nek bonkvalita, tamen, ĝuste ĝi montris la leviĝon de la ĉina brakhorloĝa industrio en Shanghai, kiun koloniistoj nomis "vendejo de ĉiulandaj brakhorloĝoj".

Hodiaŭ, la brakhorloĝa industrio de Shanghai jam multe progresis. La nombro de specoj de brakhorloĝoj atingis 16, la jara produktokvanto superis 6,140,000 kaj la kvalito de la produktaĵoj leviĝas senĉese. La brakhorloĝoj kun marko "Shanghai" estas tre bone akceptataj kaj dum 24-hora irado ĝi eraras nur 20 sekundojn.

Laboranto de la Shanghai-a Brakhorloĝa Kompanio diris, ke la brakhorloĝa industrio de Shanghai relative rapide disvolviĝis pro tio, ke samtempe kun renovigo kaj reformado al la entrepreno oni enkondukis eksterlandajn novajn teknologiojn.

Frue en 1959, kelkaj precizaj ekipaĵoj estis enkondukitaj al Shanghai, poste la laboristoj

fabrikis ankaŭ aliajn necesajn ekipaĵojn helpate de sciencaj institutoj kaj universitatoj kaj renovigis teknologion. Nun la laborproduktiveco de Shanghai en fabrikado de brakhorloĝoj leviĝis pli-ol-20-oble dank' al uzado de lasera, komputera kaj aliaj avangardaj teknikoj.

Por levi la kvaliton de balancieraj risortoj de brakhorloĝo la laboristoj faris 165 afinaciajn provojn. Kaj post mil-foja eksperimentado ili fabrikis borilon kiu povas bori 13 truojn en ĉiu sekundo.


### GRANDA ŜANĜO DE ŜPINEJO

Antaŭ nelonge, specialisto de tekstila kompanio de la Germana Federacia Respubliko vizitis la 18-an Lantekstilan Fabrikon de Shanghai. Vidinte ke lanfadeno produktita de la fabriko estas fajna, mola kaj bonkvalita, li ekinteresiĝis pri la maŝinoj kiuj ĝin produktas. Kiam ŝpinmaŝino povanta rotacii 10,600 turniĝojn ĉiuminute aperis antaŭ liaj okuloj, li mire rimarkis sur la maŝino la noton "Fabrikita en Britio en 1896", tamen efektive la maŝino estas jam tute reformita.

En la lastaj 30 jaroj, la ŝtato investis 500,000,000 juanojn al la malnovaj tekstilaj fabrikoj de Shanghai por la reformo kaj konstruo, sed la profito kaj imposto de tiuj fabrikoj al la ŝtato sufiĉas por konstrui pli ol 20 tiajn tekstilajn fabrikojn kiel tiu de Shanghai.

Ni ankaŭ rigardis reformitan spindelon kun rotacirapido de 16,000 turniĝoj minute, sed la






*Onduma tubo kun kalibro de 4.06 metroj, produktita de la Shanghai-a Fabriko de Heteroformaj Ŝtaltuboj*

malnovaj antaŭ la Liberiĝo nur povis rotacii 7,000 turniĝojn minute. Nun la produktokvanto de mil spindeloj en ĉiu horo leviĝis de 18 kilogramoj ĝis 47 kaj atingis avangardan nivelon de la mondo.

Dum la lastaj tridek jaroj oni faris renovigojn al preskaŭ ĉiu procedo de tekstilado de kotono, lano, lino kaj silko, tinkturado kaj trikado. Ekzemple la ekipaĵoj de ganto-produktado de nia lando antaŭ pli ol 20 jaroj estis preskaŭ primitivaj, kaj la laboristoj devis labori per la manoj kaj piedoj. De la jaro 1958, la ganto-produktantoj laboras unue maŝine kaj poste ankaŭ duonaŭtomate. Nun ili strebas al la uzo de komputeroj.

Mi vizitis la unuan ganto-fabrikon de Shanghai. En la laborejo funkciis, krom kelkaj duonaŭtomataj maŝinoj, 120 maŝinoj tute aŭtomataj sub regado de komputero. Tio estas evidenta kontrasto kun la peza laborado en la komenca periodo post la Liberiĝo.

La industrio de Shanghai iam havis rapidan disvolviĝon. De 1949 ĝis 1965, ĝia totala produktovaloro kreskis je 12.6% meznombre en ĉiu jaro. Sed pro detruo de la "kvarpersona bando" la pliproduktado de industrio reduktiĝis grandpaŝe de post la jaro 1967. Post la falo de la bando aktiviĝis la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj en produkto kaj dank' al tio la totala produktovaloro de industrio en 1979 kreskos per pli ol 12% kompare kun tiu de 1978.



*En la muntejo de la Shanghai-a Brakhorloĝa Fabriko*



*Produktajoj de la Shanghai-a Unua Silkaja Prestinkturejo*

# SHANGHAI— LA PLEJ GRANDA URBO DE ĈINIO

SHI BAOHUA:


## PETROLA URBO EN NOKTAJ HOROJ

**I**UN belan lunan nokton mi, kiel raportisto, venis al la petrola urbo ĉe la bordo de la Orienta Ĉina Maro kaj Hangzhou-golfo — la Shanghai-a Ĝenerala Petrolkemia Fabriko. Mal-supren rigardante de alte, mi vidis lamplumojn de miloj da familioj kiel trembriletantajn stelojn kaj flagrantan maron, kiuj donis apartan ĉarmon al la nokta pejzaĝo de la tuta kemiindustria distrikto.

Pri kio la laboristoj okupas sin post labor-horoj en tiu bela nokto? Kaj kiel ili pasigas sian liberan tempon? Kun tiaj demandoj mi turnis min al kamarado Wu Jiuyi laboranta en la tiea Kultura kaj Eduka Buroo. Li diris, ke li akompanos min en rondiro en la fabriko kaj la loĝkvartalo, kaj post tio mi trovos respondon.

Ni piediris laŭ Jingyi-strato, la plej movoplena strato en la kemiindustria distrikto. Sur la vojo ni vidis nemalmultajn homojn kun librosako ŝultre portata ien hasti. Wu Jiuyi klarigis, ke ili estas lernantoj de la televizia universitato, kiuj rapidas al ĝia studgvidejo. Ni sekvis ilin en la studgvidejon. En la klasĉambro de la maŝin-elektra fako, la lernantoj estis absorbitaj de lekciado de alta matematiko. Montrante malpli ol tridek-jaran virinon kun mallongaj haroj en la unua vico, kamarado Wu konigis al mi, ke ŝi, nomata Mei Haohan, laboras en ŝpinejo de la fabriko de akrilonitrila fibro. Antaŭ du jaroj, kiam ŝi estis baldaŭ akuŝonta, ŝia edzo estis akceptita en universitaton. Sendube ŝi sentis grandan ĝojon, ke ŝia edzo havos ŝancon

*La Shanghai-a Ĝenerala Petrolkemia Fabriko en nokto*





viziti universitaton, sed samtempe ŝi ankaŭ falis en maltrankvilon: Ŝia bopatrino estis malsana kaj ŝi mem akuŝonta. Mei havis fortan deziron fari progreson, kaj ŝi ne malhelpis sian edzon, kaj kiam finiĝis la ripoztagoj por akuŝintino, ŝi bone aranĝis la hejmlaborojn kaj enloĝiĝis kun sia bebo en loĝejon por patrino kun infanoj de la Ĝenerala Petrolkemia Fabriko. Post laboro ŝi prizorgis sian infanon kaj persistis en studo de matematiko, fiziko kaj kemio. En la lasta januaro estis fondita la televizia universitato kaj ŝi fariĝis ĝia studentino.

En tiu fabriko estis tre multaj lernemaj gejunuloj, kia Mei Haohan. El la laboristoj, Wu Jiuyi diris, ĉirkaŭ 70% estis diplomitoj el mezlernejoj en la Granda Kultura Revolucio, kiuj ne bone lernis, posedis tre malmultajn fundamentajn sciojn kaj ne atingis la nivelon de mezlerneja diplomito. Tamen ili profunde komprenis, ke ili ne povas bone funkciigi modernan entreprenon, se ili ne posedas modernajn sciencojn kaj teknikojn. Laŭ la urĝa postulo de la laboristoj la partia komitato de la fabriko, unuflanke, fondis diversajn specialajn lernejojn por kulturifakajn personojn bezonatajn de produktado, kaj, aliflanke, starigis la postlaboran edukon por laboristoj. Nun en la ĝenerala fabriko fondiĝis jam televizia universitato kaj postlabora lernejo por laboristoj, kaj ankaŭ en la dekkelkaj

branĉaj fabrikoj estis komencita la aktivado por studi diversfakajn sciencojn, teknikojn kaj kulturon.

Marŝante sur la vojo al sciencoj, teknikoj kaj kulturo, gvidantoj de diversaj niveloj en la ĝenerala fabriko donis ekzemplon. Nia veno al la fabriko komandejo koincidis kun la lekciado pri la produkta tekniko aranĝita speciale por gvidantoj. Multaj grizharaj kadroj absorbiĝis en la leciono. Tiuj maljunaj kamaradoj estis venintaj de aliaj postenoj. Tuj kiam ili atingis la fabrikon, ili elmetis antaŭ sin la celon por nepre lerni la progresintan produktan teknikon kaj kiel eble plej rapide fariĝi kompetentuloj en gvido de la moderna kemiindustria entrepreno.


Oni laŭdis la lernemon de Sun Guojin, unu el tiuj maljunaj kursanoj, respondeculo de la tria laborejo de la unua branĉa fabriko. La laborejo fabrikis aroman hidrokarbonon kaj aliajn kemiaĵojn, kaj ĝiaj ĉefaj ekipaĵoj estis importitaj el Japanio. Komence por Sun Guojin, nekonataj estis la fabrikado de tiuj produktaĵoj kaj la manipulado de tiuj instalaĵoj, kaj li decidis unue lerni la japanan lingvon. En tiu tempo oni povis vidi ofte, ke li laŭte legas en la japana lingvo en kampoj aŭ sur marbordo kaj notas en sia memoro japanlingvajn vortojn piedirante aŭ veturante. Samtempe kun tio, li diligente faris penetran studon de tekniko. En la daŭro de



pli ol unu jaro, li ne nur konis la tutan situacion de la elprena aparato por aroma hidrokarbono kun pli ol 1,000 pecoj de la instalaĵo kaj pli ol 20 kilometroj da tubaro, sed ankaŭ povis lerte uzi la instalaĵojn en ĉiu ĝia produkta branĉo. Kiam ni demandis Sun Guojin, kio donis al li forton en lia lernado, li respondis kun rideto: "La ŝtato konfidis al ni la importitajn progresintajn instalaĵojn, do ni devas ilin bone uzi kaj per tio ni ne vanigos la konfidon kaj esperon de la ŝtato."

Ni venis en la laboristan loĝkvartalon. En iu domo maljuna kamarado kun aĝo de pli ol 50 jaroj, sin klinante super tablon, atente faras korektadon de la hejmtaskoj de siaj lernantoj. Wu Jiuyi prezentis al mi, ke li estas kamarado Qian Shanshi, entuziasma instruisto de la postlabora eduko en la petrolkemia fabriko. Kiam li vidis nin, li tuj demetis siajn malmiopajn okulvitrojn kaj ekbabilis kun ni en gajeco. Qian Shanshi dediĉis siajn 37 jarojn al la aŭtomobila tekniko. Li estis kulio kaj analfabeto en la malnova socio. Nur post la Liberiĝo li komencis lerni legadon. Dank' al sia diligenteco li akiris la ŝancon viziti noktan mezlernejon. En la jaro

*Petrola kajo de la fabriko*



1962, elektite de sia fabriko, li estis sendita kiel lernanto en la Shanghai-an Politeknikon. Li diris, ke li profunde komprenis la gravecon levi la nivelon de sciencoj kaj kulturo. En 1976, Qian Shanshi eklaboris kiel teknika estro de la unua taĉmento de aŭta transporto. En tiu taĉmento estis multaj novaj ŝoforoj, kiuj, kvankam povosciis stiri, tamen nebule konis la fundamentojn de la aŭta strukturo kaj ne scipovis ripari aŭton kiam ĝi difektiĝis dum veturado.

Tio multe maltrankviligis Qian. Lastjare li memvole prenis sur sin la direkton al la trejna kurso de aŭta tekniko. Li bone laboris en la taĉmento kaj samtempe bone utiligis la tempon por disvolvi la instruadon. Tage li foje kaj refoje rampis, kune kun la kursanoj, sub aŭton por ekspliki ĝian strukturon kaj teknikon de riparo. Nokte li preparis lecionon kaj korektis hejmtaskojn, kaj samtempe prizorgis sian malsanan edzinon. Krome li per la tuta subvencio, kiun la fabriko donis al li por la instruado, aĉetis multajn librojn pri teknikaj scioj de aŭto kaj ilin disdonis al la kursanoj. Dank' al la fervora instruado kaj helpado de Qian, rapide altiĝis la teknika nivelo de la novaj aŭtistoj.

Ni vidis, ke en la laborista loĝkvartalo iuj laboristoj absorbite legas sciencajn kaj teknikajn librojn, aliaj sidas super siaj hejmtaskoj de matematiko, fiziko kaj kemio, triaj aŭskultas kurson de fremdaj lingvoj, kaj kvaraj estas interesataj de noveloj aŭ verkado de poemoj. La antaŭaj poker-maniuloj fariĝis nun aktivuloj en studo de sciencoj kaj teknikoj. Diligenta lernado fine alportis abundajn fruktojn. Pli ol 500 laboristoj en la fabriko diligente studis kaj rapide levis sian teknan nivelon, tial ili anticipe fariĝis regulaj laboristoj aŭ estis promociitaj, kaj multaj el ili prenis la oficon de skipestro kaj fariĝis ĉefa forto en produktado.

Profunde impresis min la viveca bildo, ke la laboristoj de la Shanghai-a Petrolkemia Fabriko penetre studas sciencojn kaj teknikojn por modernigi Ĉinion. Revenante mi vidis kelkajn lernantajn fremdan lingvon kaj ilia voĉlegado miksiĝis kun la bruo de marondoj alblovitaj de nokta vento.



# PRI LA LIBRO “SHANGHAI, PARADIZO DE AVENTURISTOJ”

**E**KDE la tridekaj jaroj oni nomis Shanghai “paradizo de aventuristoj”. La nomo estis lanĉita de la libro «Shanghai, Paradizo de Aventuristoj» verkita de iu fremdlandano kaj tradukita de Axue. La libro estis eldonita de la librejo Vivo en 1937 kaj estis varme akceptata de la publiko. Surbaze de historiaj faktoj, la libro malkaŝis la krimon de imperiistoj. Ekde 1843, kiam Shanghai estis malfermita al fremdlandaj komercistoj, aroj kaj aroj da imperiistoj, inkluzive de murdistoj, friponoj, gangsteroj, kanajloj k. s., svarme venis al Shanghai. Ili faris diversajn malbonojn kaj aventurojn, utiligante la koncesiitajn kvartalojn kaj konsulan jurisdikcion.

Pro la malsamaj talentoj en artifikado, tiuj aventuristoj akiris malsamajn “sukcesojn”. La unuarangaj aventuristoj estis ege aŭdacaj kaj kruelaj, kaj havis grandan povon. Ili okupis sin pri negoco de municio kaj opio, de kiu ili fariĝis milionuloj. Kaj la duarangaj establis hazardludejojn sub iaj trompaj elpendaĵoj de “Kurkonkursita Klubo”, “Centra Aŭditorio” k. s., per kiuj ili akiris ĉiutage multe da mono. Iuj aliaj friponoj ruzaj, kiuj havis eĉ neniun groŝon, fondis blankajn kompaniojn, bankojn, mondeponejojn k. s., per kiuj ili avide suĉis la sangon de la ĉina popolo. Patronate de la konsula jurisdikcio, ili ne bezonis registri sin al la ĉina registaro, nek kunportis legitimajon, kaj ili povis fari diversajn trompaĵojn por kapti pli da povo. Se iu malsukcesis en sia aventurado aŭ estis malkaŝita, li povis fuĝi ne-

haste foren kunportante sian tutan havaĵon. Dum la ĉinaj laboruloj, kies mono akumulita en longa tempo estis forrabita de tiaj friponoj, falis en pereon. Sed tiuj trompisto, post 2-3 jaroj, revenis al Shanghai ŝanĝinte sian nomon kaj naciecon, kaj denove ekfaris trompaĵojn senkrupule.

Ankaŭ troviĝis mallertaj aventuristoj. Tra diversaj kanaloj ili faris sin direktoroj de granda hotelo, aŭ misiistoj, ĵurnalistoj de fremdlanda ĵurnalo ktp. Iuj el ili eĉ ne bezonis “alivesti” sin, sed nur montris sin “okcidentanoj”, kaj tio jam sufiĉis por ili en pruntepreno, senpaga frandado k. s. Kiam ili multe ŝuldis ĝis super la ŝultroj, ili malaperis sen ajna postsigno.


Sed kian vivon vivis la laboruloj, veraj mastroj de Shanghai? Efektivan priskribon prezentis la libro «Shanghai, Paradizo de Aventuristoj»:

“... Ĉiutage ili laboras 10, 12 aŭ 15 horojn. Ili devas elteni malhumanan traktadon, plenumi labo-

ron malfacile plenumeban per homa forto, dum rekompenco al ili estas nur dekoj da groŝoj. . . En ekstreme malvarma vintro, ili havas sur si nur maldikan ĉifonan vatveston, sed tamen ili devas penlabori kiel kutime. En longa somero sub temperaturo de 100° F, ili ankoraŭ faras laboron malfacile plenumeban per homa forto. . .” “... senĉese kuradas rikiŝistoj. Sur iliaj palaj vizaĝoj montriĝas lacigo.” “Iafoje, kiam klientoj-okcidentanoj estis riproĉitaj de sia malkontenta edzino aŭ malgajnis en hazardludo, la rikiŝisto estis rekompenĉita per bato de irbastono aŭ piedo, anstataŭ per moneroj.”

Dum la reakcia regado de Kuomintang, la libro «Shanghai, Paradizo de Aventuristoj» ne povis esti publike vendata, pro la minaco de la aventuristoj. Ĝin reprenis la Shanghai-a Kultura Eldonejo post la Liberiĝo, en 1956. La vera nomo de la tradukinto Axue estas Bao Yuke, kiu estis iam vicestro de la fakultato de la ĉina lingvo de la Shanghai-a Normala Instituto.

*Antaŭa vetkurejo (nun tie estas la Popola Parko)*



**E**STIS posttagmezo de la 14-a de aprilo, 1979. Griza aŭtomobilo galopis sur la ŝoseo. La veturanto kun griza hararo kaj okulvitroj estas usona ĉino Jiang Yingcheng, geografia profesoro de la Universitato de Illinois en nordorienta Usono. Invitite de la Ĉina Akademio de Sciencoj, li venis al Ĉinio por doni lekciojn. Hodiaŭ, li ĝoje revenis al sia naskiĝloko — Dongtai-gubernio de Jiangsu-provinco, kiun li forlasis jam antaŭ 42 jaroj. Sinjoro Jiang avide rigardis eksteren tra fenestro de la aŭtomobilo kaj klopodis kapti en la memoro bildojn de sia hejmloko. Larĝa pavimita vojo etendiĝas antaŭen, arboj staras en du vicoj ambaŭflanke de la vojo, ebena kamparo simila al ŝaktabulo sterniĝas ĝis la horizonto kaj novaj loĝdomoj de la komunumanoj staras en vicoj. Tie li eĉ ne trovis postsignon de la kota vojo, sur kiu li veturis en unurada puŝĉaro al lernejo de la gubernia urbo en sia juneco, la alkalaj kampoj kaj amasoj da tomboj. Li eĉ ne kuraĝis kredi, ke tie estas lia hejmloko.

Kiam li atingis la gastejon de la revolucia komitato de Dongtai-gubernio, k-do Zhou Ji, vicestro de la komitato, venis lin vidi. Je la renkontiĝo sinjoro Jiang diris al li: “Sufiĉe bone konstruita estas la vojo de nia hejmloko!” Sinjoro Jiang demandis, kun kora zorgo, kamaradon Zhou, kiel disvolviĝas la industrio kaj agrikulturo de la hejmloko. La lasta diris: “Antaŭ la Liberiĝo, la agrikultura produktado de la gubernio estis tiel postiĝinta pro gravaj sekegeco, inundo kaj alkalo, ke la mua (1 muo = 1/15 hektaro) produktokvanto de greno estis nur 150 aŭ 200 kilogramoj, kaj tiu de sensemigita kotono nur dekelke da kilogramoj. Dank’ al 20-jara riverojungado, kampo-konstruado kaj zorga mastrumado, la mua produktokvanto de greno en la pasinta jaro atingis pli ol 480 kilogramojn kaj tiu de sensemigita kotono 73 kilogramojn.” Sinjoro Jiang diris ĝoje: “Relative alta estas tiu produktokvanto.” Li plie demandis, ĉu konstruiĝis ŝoseo ĉe la fora marbordo. Zhou respondis: “Tie troviĝas du larĝaj kaj ebenaj vojoj, kiuj kondukas al 18 komunumoj en marborda regiono.” Jiang demandis plue: “Ĉu marbordaj etendaĵoj estas utiligitaj?” Zhou respondis: “Ni jam transformis centmilojn da muoj da ili en unu forstkul-

CAO JINJIE KAJ REN KANGLING:

# Hejmreveno post 42 jaroj



turejon, unu sal-produktejon, du agrikulturajn komunumojn kaj unu bredejon de marproduktajoj inkluzive purpuran legomon (*Porphyra tenera*), salikokojn kaj zibelojn (*Martes Zibellina*).” Tion aŭdinte, sinjoro Jiang kapjesis dirante: “Bone, bone!”


En la sekvanta antaŭtagmezo, sinjoro Jiang veturis per la aŭtomobilo al sia naskiĝloko — la urbeto Liangduo ĉe la bordo de la rivero Chuanchang. Tie li naskiĝis en 1914. Lia patro Jiang Jinghu estis ĉin-medicinisto kaj mem funkciigis malgrandan apotekon. Lia malnova domo kontraŭsuna ankoraŭ bonorde sidas en malgranda kvadrata korto ĉirkaŭita de muroj, en kiu loĝas nun lia kvara frato Jiang Yinghua kun sia familio. Post la hejmreveno de sinjoro Jiang, multaj parencoj kaj amikoj vizitis lin kaj interparolis kun li pri pasintaĵoj. Iu maljunulino kun griza hararo ĝoje diris jam ĉe la sojlo: “Sinjoro Yingcheng, ĉu vi memoras min ankoraŭ?” Stariĝinte kaj mezurinte ŝin per rigardo sinjoro Jiang diris ridetante: “Vi estas Yang Lanying, ĉu ne?” Ili ambaŭ ekridegis. Yang Lanying estas vicestro de fabriko de la komunumo. Sinjoro Jiang demandis, kiom da gefiloj ŝi havas kaj kie ili laboras, kaj la lasta respondis liajn demandojn unu post alia. Jiang diris: “Ha, du studentoj en via familio!” Pli juna frato de Jiang intermetis: “Ja multaj studentoj estas en nia komunumo, ankaŭ mi diplomitiĝis el la Nanjing-a Politekniko.” Tion aŭdinte sinjoro Jiang tre ĝojis, li ja ne atendis ke en tiu izola loko troviĝas tiel multaj studentoj. Intertempe venis alia viglanima maljunulo. Lin vidinte sinjoro Jiang tuj stariĝis kaj faris kelkajn paŝojn al li dirante: “Ha, instruisto Lu, estis vi kiu klerigis





min en la elementa lernejo! Eble vi jam havas aĝon de pli ol 80 jaroj?” Lu respondis: “82 jaroj.” Sinjoro Jiang rememoris sian vizitadon al la lernejo en la juneco. Tiam en la urbeto troviĝis nur unu elementa lernejo kun malmultaj lernantoj en antikva templo. Li vizitis malsuperan mezlernejon en la guberniurbo kaj poste daŭrigis la lernadon en Suzhou. Rememorante tion, li demandis ĉu la domoj de la malnova elementa lernejo ankoraŭ ekzistas. Oni diris al li, ke la domoj estis fordetrinitaj en milito kaj la nuna elementa lernejo estas nove konstruita. Post la interparolado, li vizitis la lernejon kun granda intereso. En ĝi li fotis siajn amikojn kaj parencojn. Yang Ling, vicestro de la lernejo, diris al li, ke la lernejo havas 17 klasojn kun pli ol 800 lernantoj kaj en la tuta komunumo troviĝas 35 elementaj lernejoj, pli ol 20 mezlernejoj kaj 4 superaj mezlernejoj. Li ĝojis pro la disvolviĝo de la eduka afero de la patrolando.

*Profesoro Jiang Yingcheng (la meza), liaj dua frato (la dekstra) kaj kvara frato*




Tagmeze lia kvara frato Yinghua regalis lin kaj aliajn parencojn kaj amikojn per lokaj vino kaj pladoj. Sinjoro Jiang laŭdis: “Bongustaj estas la pladoj, tian manĝon mi ne gustumis eksterlande dum multaj jaroj.” Li diris al la gastoj, ke en Usono estas tre malfacile akiri ĉinan pladon, kaj ke se oni volas gustumi ilin, oni devas iri al ĉinaj restoracioj en urbegoj kaj multe pagi. La kunmanĝantoj diris: “Tom pli ol 10 juanoj jam sufiĉas por pagi niajn hodiaŭajn pladojn.”

Post la tagmanĝo, sinjoro Jiang transiris al la temo pri la medicina kaj higiena aferoj de sia hejmloko. Lia frato Yinghua informis lin pri tio. Antaŭ la Liberiĝo, en la urbeto Liangduo sin trovis nur 5 ĉin-medicinaj kuracistoj kiuj samtempe funkciigis apotekon, kaj ĉirkaŭe loĝantaj kamparanoj devis piediri dekojn da kilometroj por ricevi kurachelpon de ili. Nun en la komunumo troviĝas hospitalo kun pli ol 20 kuracistoj kaj 40 malsanulaj litoj. Krome ĉiu el la 30 brigadoj havas unu kuracejon, unu kuraciston kaj du kamparanojn-kuracistojn, kaj en la produktaj taĉmentoj servas pli ol 250 sanprotektantoj. Koopera kuracosistemo estas ĝenerale efektivigata en la kamparo kaj malsanulo pagas nur 0.05 juanon por unufoja kuraco.

Posttagmeze li revenis al la gubernia urbo por vidi la duan fraton Yingqing kiu laboris en la

*Jiang Yingqing (la dua de dekstre) ekzamenas malsanulon en la gubernia hospitalo.*



Popola Hospitalo de la gubernio. Yingqing, same kiel Yinghua, estas ĉin-medicina kuracisto fama en tiu loko. Ankaŭ la kvin filoj kaj unu filino de Yingqing venis vidi sian onklon. Kiam sinjoro Jiang informiĝis, ke la kvin nevoj ĉiuj laboras kaj la nevino studas en iu kolegio, li diris kun emocio: "Vere feliĉaj estas la gejunuloj en la patrolando kiuj ne bezonas zorgi pri manĝo, vesto kaj laboro."

Falis noktokurteno. Zhou Ji refoje venis por lin vidi. Ili ascendis la balkonon de domo por kune apreci noktan pejzaĝon de la guberniurbo. Kamarado Zhou diris fingre montrante la stratojn prilumitajn de vojolampoj: "Ĉi tiu strato estas nova, tiu estas malnova sed larĝigita." En la memoro de sinjoro Jiang la strato estis tiel mallarĝa ke povis ĝin trapasi nur rikiŝo, sed ĝi nun jam aliformiĝis. Fingre montrante malproksiman lokon kie brilas lampoj kaj dancas veldaj briloj, kamarado Zhou diris: "Tie estas fabri-

koj." Sinjoro Jiang demandis: "Kiaj fabrikoj estas tie?" Zhou respondis: "Antaŭ la Liberiĝo, tie troviĝis nur malgrandaj termoelektrejo, ferajfarejo kaj prilaborejo de oleo kaj rizo, tamen nun 40 fabrikoj estas starigitaj, inkluzive relative grandajn fabrikojn de agrikulturiloj, kemisterko kaj tekstilaĵoj." Sinjoro Jiang diris: "Estas ne facile akiri tiel grandajn sukcesojn por la patrolando ankoraŭ relative postĝinta."

Sinjoro Jiang estas estro de la studa asocio de Usono pri ĉinaj problemoj kaj amas Ĉinion. Antaŭ la stariĝo de la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono, li ĉiam sopiris al la patrolando, kaj post tio li decidis kontribui sian forton por unuigo de la patrolando. Ankaŭ li kaj lia edzino profesorino Fang Meiqiun subskribis la leteron al Jiang Jingguo por instigi la lastan interkonsiliĝi kun la Komunista Partio de Ĉinio pri kunlaboro kaj efektivigo de paca unuigo de la patrolando laŭ la internacia tendenco.

## FREMDLINGVAJ PERIODAĴOJ EL ĈINIO

"**Beijing-a Revuo**" Semajna gazeto pri politiko kaj sociologia teorio, eldonata en la angla, franca, germana, hispana, japana kaj araba lingvoj kaj distribuata aerpoŝte al diversaj lokoj de la mondo.

"**Ĉino**" Monata bildgazeto kun konciza teksto, eldonata en la angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, svahila, urdua, vjetnama kaj rumana lingvoj.

"**Ĉinio en Konstruado**" Ĝenerala monata ilustrita gazeto eldonata en la angla, franca, hispana, araba kaj germana lingvoj.

"**Ĉina Literaturo**" Monata literatura revuo eldonata en la angla kaj franca lingvoj.

"**Popola Ĉinio**" Monata gazeto eldonata en la japana lingvo.

"**Scientia Sinica**" Monata revuo eldonata ĉefe en la angla lingvo.

"**Chinese Medical Journal**" Monata revuo en la angla lingvo.

"**Ĉina Ekstera Komerco**" Dumonata revuo kun relative multaj bildoj, eldonata en la angla, franca kaj hispana lingvoj.

"**Women of China**" Monata revuo en la angla lingvo.

"**China Sports**" Monata revuo en la angla lingvo.

### ABONU KAJ ABONIGU

Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe peranto vialoka, aŭ rekte per letero ĉe GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 399, Beijing, Ĉinio





## LA FIERA MULTKOLORA KATETO

(88Es-154-P)

Tiu ĉi porinfana bildlibro kun 38 koloraj pentraĵoj priskribas, kiel iu multkolora kateto ne respektas alies laboron, malestimas ĉion kaj pro tio ĝi renkontas ĉie obstaklojn. Fine ĝi vidis sian eraron.

38 paĝoj 18 cm. × 20.7 cm.

Prezo: £ 0.22 US \$ 0.40 FF 2.00 DM 1.10

## BELA REVULO

(88Es-152-P)

Tio ĉi estas porinfana bildrakonto kun 38 koloraj pentraĵoj.


En ĝi estas priskribita iu bela revema birdo, kiu ne diligente lernas, tial en nenio sukcesas. Fine ĝi konsciis sian eraron sub la helpo de siaj kunuloj.

40 paĝoj 18.5 cm. × 21 cm.

Prezo: £ 0.22 US \$ 0.40 FF 2.00 DM 1.30

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio  
Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de  
GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la peranto aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto.



---

# BONA ZORGADO AL SENHELPAJ MALJUNULOJ

---

**A**NTAŬ nelonge mi vizitis Maljunulan Hejmon de Nanyuan-komunumo en antaŭurbo de Beijing. Tie la aero estas freŝa kaj sur la vasta verda rizkamparo interplektiĝas kanaloj. Unu aleo kondukas de la komunuma oficejo rekte al la Hejmo. En la kvietaj korto troviĝas tri vicoj da domoj. En la centro de la korto estas baseno kun orfiŝoj, ĉirkaŭ ĝi metiĝas vazoj kun floroj kulturataj de la maljunuloj. En la norda domo estas legoĉambro, kuracejo kaj kabineto, kaj la domoj ambaŭflanke de ĝi estas uzataj kiel dormoĉambroj kaj manĝejo.

Respondeculo de la Maljunula Hejmo Wang Wen Yao diris al mi, ke antaŭe tie estis marĉa tereno kun dense kreskantaj fragmitoj. En 1966 oni plenigis ĝin kaj konstruis sur ĝi domojn kun 56 ĉambroj por la Maljunula Hejmo. Antaŭ la Liberiĝo plejparto de la tieaj loĝantoj laboris kiel tag-dungitoj de bienuloj aŭ sin okupis pri kolportado. Ili vivis tre mizere kaj plejparte ne povis edziĝi. En sia maljuneco multaj el ili fariĝis senhelpaj soluloj. En la malnova Ĉinio tragedia sorto ilin atendis. Multaj el ili devis almozpetadi kaj iuj eĉ mortis sur stratoj pro frosto en vintro. Post la Liberiĝo tiuj senhelpaj maljunuloj ricevis bonan zorgadon. La popola komunumo provizas ilin per manĝaĵoj, vestaĵoj, loĝejo kaj kuraciloj kaj ĉiumonate donas al ili certan subvencion. Kun senĉesa disvolviĝo de la kolektiva ekonomio de la komunumo oni fondis la Maljunulan Hejmon.

Nun en la Hejmo vivas 66 gemaljunuloj kun meznombra aĝo de 73 jaroj, al kiuj servas 15 laborantoj. La komunumo ĉiujare prenas el la komuna bonstatiga fonduso 30,000 juanojn por funkciigi la Hejmon. Ĉiu dormoĉambro estas loĝata de 1-3 maljunuloj kaj apartaj ĉambroj estas aranĝitaj por grave malsanaj kaj tiuj kiuj ne povas mem sin zorgi. Krom litaĵoj kaj tualetaĵoj ĉiujare oni donas al ili kompletan daŭritajn vestojn, du kostumojn, du ĉemizojn, du kalsonojn, jakon kaj paron da ŝuoj. Ĉiumonate ili ricevas certan sumon kiel poŝmonon. En festaj tagoj ili ricevas kukojn, bombonojn kaj fruktojn. Kaj iliaj vestaĵoj kaj litaĵoj estas lavitaj de aliaj en difinitaj tempoj.

Akompanate de Wang Wen Yao, mi vizitis ilian kuracejon. Tie laboras unu profesia kuracisto, kiu povas kuraci ordinarajn malsanojn. Ĉiujare la apuda hospitalo sendas siajn kuracistojn al la Hejmo por fari korpoekzamenon al la maljunuloj.

Kiam ni venis al la loĝejo de la maljunuloj, ni vidis bonorde vestitan maljunulinon aŭskultanta radioprogrameron en pura ĉambro. Laŭ ŝia aspekto kaj rekta talio mi konjektis, ke ŝi havas aĝon de ĉ. 80 jaroj. Sed fakte, ŝi jam estas 105-jara. Kvankam ŝiaj oreloj aŭdas ne tre klare, ŝiaj aliaj organoj bone funkcias. Tie mi demandis pri la vivo de la maljunuloj.

K-do Wang Wen Yao diris al mi, ke tiuj maljunuloj estas laboruloj kaj ili volis fari iom da fizika laboro. Tial la komunumo donis al ili 0.7 hektaron da agro kiel legomĝardenon. K-do Wang kondukis min al la ĝardeno, kie mi vidis bone kreskantajn kukurbojn, tomatojn, melongenojn, kapsikojn k.a. legomojn. Li diris, ke la maljunuloj povas rikolti sufiĉe da legomoj por sia bezono. Matene iuj el ili flegas legomojn en la ĝardeno kaj aliaj promenas. Post matenmanĝo ili ludas ŝakon aŭ kartojn sub arboj. Post siesto iuj iras viziti parencojn en la vilaĝo. Post vespermanĝo plejparto de la maljunuloj ŝatas rigardi televidajn programerojn. Krome ili ankaŭ ofte vizitas kinejon apud la Hejmo. En festaj tagoj geknaboj de la elementa kaj mezgrada lernejoj venas al la Hejmo por prezenti al la maljunuloj artajn programerojn. En printempo




kaj aŭtuno oni organizas ilin por ekskursi al la Imperiestra Palaco, Beihai-parko, Somera Palaco kaj aliaj pitoreskejoj.

Sonorado rimarkigis nin, ke estas tempo por tagmanĝo. Ni venis en la manĝejon de la maljunuloj. Por tiu tagmanĝo oni preparis vermicelon kun ovaĵo kaj viando. Iu administranto de la manĝejo diris, ke por vekita apetito de la maljunuloj, la kuiristoj neniam faras saman manĝaĵon en ĉiu tagdeko. Por la malfortaj kaj malsanaj oni aparte preparas likvajn kaj nutrozajn manĝaĵojn.

Post la tagmanĝo ni venis sub vitan laŭbon ekster la manĝejo kaj vidis, ke iu maljunulo tie ripozas. Vidinte nin, li tuj stariĝis por nin saluti. Li nomiĝas Li Yucai kaj havas ĉijare la aĝon de 76 jaroj. Lia travivaĵo, oni povas diri, estas miniaturo de la vivo de la laboranta popolo de Nanyuan.

Kiam Li Yucai estis 6-jara, li perdis sian patron, kaj estante dekjara li devis falĉi herbojn, mueli grenon kaj labori sur kampoj por bienulo. Lia tutjara salajro, krom pago por manĝo, sufiĉis nur por aĉeti paron da ŝtrumpoj. Poste li laboris kiel metilernanto en iu grenvendejo en Beijing. Pro netolerebla turmentado de kapitalisto li forlasis la grenvendejon kaj iris al Shijingshan-ferminejo por dorsporti ercon, kaj poste al Mentougou por dorsporti karbon en galerio. Tiam li suferis ne nur vipadon de la japanaj agresantoj, sed ankaŭ ekspluatadon de laborĉefoj. Kaj tiaj mallumaj tagoj daŭris ĝis la liberiĝo de Beijing.

En la jaro de la Liberiĝo la popola registaro distribuis al li domon kun du ĉambroj kaj 16 muojn (15 muoj = 1 hektaro) da agro, kaj li komencis vivi feliĉe. Kiam li maljuniĝis, la komunumo sendis lin en la Hejmon. Li diris al mi: "Nur sub la socialisma reĝimo, mi senhelpa maljunulo, havas eblecon senzorge pasigi miajn lastajn jarojn."



# Vinfarado

## en Yantai



de MOU ZHENTAO

*La ruĝa vino (unua de maldekstre), brando (la dua de maldekstre) kaj vermuto (la dua de dekstre) produktitaj de Yantai*

**A**NTAŬ nelonge mi vizitis la Vinfaran Kompanion de Yantai en Shandong-provinco. La kompanio havas historion de ĉ. 90 jaroj kaj produktas diversspecajn vinojn inkluzive de la tonikaj. Inter ili troviĝas la famaj speciala bona brando, Zhifu-a ruĝa vino kaj tonika vermuto, kiuj havas grandan debiton en- kaj eksterlande.

En la eksponejo de la kompanio oni povas vidi diversajn vinojn en malsamformaj ujoj kun la fabrikmanko "Sunfloro". Precipe la nacistilaj vinuoj de tonika vino, faritaj el vitro kaj fajenco en formoj de barelo, plata botelo kaj lage-nario, vekis ĉe mi grandan intereson.

Ĉiufoje kiam gastoj vizitas la kompanion, la mastro metas pokalojn kun malsamaj vinoj sur tablon kaj petas ilin gustumi. Poste oni detale rakontas al ili la karakterizojn de diversaj vinoj. Ekzemple, la speciala bona brando estas ore flava, diafana, milda, aroma kaj gustoriĉa.

La Zhifu-a ruĝa vino estas rubenkolora, dolĉa kaj gustoplena. La tonika vermuto estas pli ruĝa ol la ruĝa vino, dolĉa kaj kun droga aromo, kaj ĝi povas refreŝigi.

Tiuj tri famaj specoj de vino estas faritaj el vinberoj. La brando kun 40% da alkoholo estas preparita el fermentinta suko de plej bonaj vinberoj kaj konservita en kverkbareloj dum multaj jaroj. Vermuto estas preparita el superaj blankaj vinberoj kun aldono de valoraj drogoj kiel cinamo, muskato kaj tibeta krokuso (*Crocus sativus L.*). Tiu vino kun nur 18% da alkoholo povas vigligi sangocirkuladon, refreŝigi spiriton kaj mildigi lacecon. La ruĝa vino kun 16% da alkoholo estas preparita el du specoj de vinberoj Jiebaina kaj Meiguixiang kun konvena kvanto da glukozo kaj diversaj vitaminoj. Ĝi povas kuraci anemion. Tiuj vinoj servas kaj kiel nektaroj kaj kiel tonikaĵoj.




La kompanio situas en la pitoreska marborda urbo Yantai kaj estis fondita de iu ĉina elmigrinto-komercisto en la jaro 1892. Tiam ĝi portis la nomon "La Zhangyu-a Vinfara Kompanio". Antaŭ pli ol 70 jaroj ĝiaj vinoj jam ĝuis grandan famon en kaj ekster Ĉinio. En la Panama Internacia Foiro okazigita en 1915, la speciala bona brando kaj Zhifu-a ruĝa vino produktitaj de la kompanio ricevis orajn medalojn pro sia supereco. Siatempe s-ro Sun Zhongshan (Sun Jatsen) eĉ manskribis vortojn por laŭdi la brandon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, en la jaro 1956 okazis la Tutlanda Vinogustuma Kunveno kaj tiuj tri vinoj de la kompanio estis elektitaj kiel tri el la ok superaj vinoj de Ĉinio. En la jaro 1963, tiuj tri vinoj daŭre tenis sian renomon kaj estis premiitaj per oraj medaloj en la dua vingustuma kunveno. Nun la tri vinoj estas ne nur superaj trinkaĵoj en bankedo kaj valoraj donacaĵoj por gastoj en Ĉinio, sed ankaŭ eksportataj al Japanio, Malajzio, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Rumanio, Xianggang (Hongkong) kaj Aomen (Macao).

En la malnova Ĉinio, kvankam la vinoj produktitaj de la kompanio jam estis fame konataj, tamen la jara produktokvanto de ili estis nur ĉ. cent tunoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ŝtato helpis la kompanion per kapitalo, krudmaterialoj kaj ekipaĵoj, tiel ke ĝia produktokvanto en 1978 jam atingis dekmil tunojn. Ankaŭ la specoj de vino plimultiĝis de 4 ĝis 12, el kiuj 9 estas eksportataj. Kaj la eksportita kvanto de ili pliiĝis multe.

Akompanate de la entuziasma mastro, ni mal-supreniris laŭ la spirala ŝtonŝtuparo en la vastan vinkelon, en kiu bonorde kuŝas kverkaj bareloj de diversa grandeco. La plej granda el ili havas diametron de du metroj kaj longas je tri metroj. Diversspecaj kaj malsamaĝaj likvoroj estas konservataj en ili. La vinuoj aspekte antikvecaj kaj pezaj mirigas la vizitantojn. La mastro diris al mi, ke tiuj vinuoj havas multan superecon ol la aliaj. Ili povas plidensigi la aromon de likvoro. La ora koloro kaj aparta bonodoro de la brando estas ricevitaj ĝuste dank' al tia konservado en la zorge faritaj kverkbareloj, kiuj devas esti absolute likimunaj. Se oni ne propraokule vidus la kelon, oni ne kredus, ke tiuj nektaroj estas preparitaj en tiaj antikvaj ujoj.

*Pakado*



*Ce laborlinio en la vinfarejo de la kompanio*



# Gulangyu, ĝardeno sur maro

de MIN FENG

**S**UDOKCIDENTE de la urbo Xiamen de Fujian-provinco troviĝas insulo Gulangyu. Pro ĝia beleco oni nomas ĝin "Surmara Ĝardeno". Ĝin apartigas disde la kontinento la markolo Lujiang, kaj por atingi la insulon, oni devas veturi 5 minutojn per pramsipo.

Surpaŝinte la insulon, vi tuj rimarkas, ke la tuta insulo estas kovrata de diversaj arboj, ekzemple, banjanoj kun vastega krono, nuboskrapantaj kasuarinoj, sveltaj kokosarboj, eriototriujoj, akacioj kaj agavoj. Kvankam tie troviĝas komerca kvartalo, tamen oni ne aŭdas stratan bruadon. Ambaŭflanke de la aleoj ne grandaj domoj kaŝiĝas en verdaĵoj. Multaj familioj kulturatas, en sia korto, orkideojn, rozojn, krizantemojn kaj diversajn kaktajn, kaj ankaŭ ornamas la murojn kaj tegmentojn per floroj en vazoj. Tial la tuta insulo aspektas kiel grandega florbedo.

Gulangyu havas ankaŭ la kromnomon de "Insulo de muziko". Tie multaj familioj havas pianon, akordionon aŭ violonon. Promenante en ombrejo, vi povas aŭdi, de tempo al tempo, muzikon aŭ kantojn.

La plej alta monto de la insulo estas Longtoushan. Kovrata de densa verdaĵo, ĝi rigardas al la monto Hutoushan sur la duoninsulo Xiamen transe de la maro. Sur la montpinto Longtoushan sidas giganta ŝtono nomata Riguangyan. Sur rokmuro sub la ŝtonego estas gravuritaj la ideografiaĵoj signifantaj "la beleco de Gulangyu superas ĉion ambaŭflanke de Lujiang-markolo". Tie oni povas aŭdi bruon de vento kaj muĝadon de la maro. Post nelonga irado ĉirkaŭ la dekstra flanko de la rokmuro oni atingas la ŝtonegon Riguangyan.

Ĉe la talio de la monto staras ŝtona pordego. Ĝi estas restaĵo el la monta kampadejo de la ĉinacia heroo Zheng Chenggong (1624 — 1662). Najbare de la tiama kampadejo estas giganta ŝtono, sur kiu Zheng Chenggong komandis siajn marajn trupojn dum ekzerco.

Se oni trapasas la montan kampadejon kaj supreniras laŭ serpentina vojeto, oni povas vidi ke ambaŭflanke pli kaj pli multiĝas ŝtonegoj, starantaj aŭ kuŝantaj. Tie troviĝas "la Someruma Kaverno", en kiu troviĝas multaj groteskaj ŝtonoj. Dum ventado oni povas aŭdi en la kaverno grandan bruon similan al muĝado de maro. Iru supren de la kaverno laŭ ŝtuparo, kaj vi atingos la plej altan lokon de Gulangyu, nome la supron de Riguangyan.

La supro de la rokego estas cirkla ebenejo ĉirkaŭata de balustrado. La ebenejo povas enteni 20 kaj iom pli da homoj. Tie starante en milda

mara vento, oni sentas grandan ekstazon. Rigardante foren, oni povas vidi insulojn Houtouyu kaj Dayu nordokcidente kaj Xiamen okcidente de Gulangyu. Se vi rigardas malsupren, vi povas vidi la urbon Xiamen kaj la tutan Gulangyu, ornamitan de floroj, arboj, pavilonoj kaj aliaj belaj konstruaĵoj. Ruliĝantaj ondoj frapegas la rokan bordon kaj aŭdigas bruegon de tamburado.

Iru malsupren de Riguangyan suden, kaj vi venos al la parko Yanping. En la parko estas antikva puto fosita, oni diras, de soldatoj de Zheng Chenggong. En 1962, okaze de la 300-a datreveno de la repreno de Taiwan fare de Zheng Chenggong, oni konstruis sub Riguangyan Muzeon de Zheng Chenggong. En la muzeo oni ekspozicias armilojn, mapojn kaj aliajn objektojn uzitajn de Zheng Chenggong. Proksime de la muzeo estas ĝardeno Shuzhuang, konstruigita de riĉulo Lin Shuzhuang de Taiwan. En la ĝardeno kreskas diversaj valoraj subtropikaj floroj.

Sur Riguangyan estas arkforma strando borderita per granitaj benkoj. Ĉirkaŭ la strando kreskas flamarboj, arĝentaj poploj, palmoj kaj aliaj. Vasta gazono sternaĝas kiel tapiŝo. Ĉiutage en somero miloj kaj miloj da homoj venas por naĝi.





# GULANGYU

La insuleto Gulangyu apud Xiamen, kiu portas kromnomon "Surrara Ĝardeno", havas tre belajn pejzaĝojn. En somero ĝin vizitas multaj turistoj.



Nuba maro de Gulangyu




Argentaj ondetoj




Teraso sur monto, kie la ĉina nacia heroo Zheng Chenggong siatempe direktis manovron de la mara armeo








Pramejo en nokto



Ĉe marbordo

En la parko Gulangyu



Vespera čielruģo



# 23 JAROJ PER KAJ POR ESPERANTO



*Busto de Armand Su (farita de Mary Collins, 1968, en Usono)*

## 1

**M**I aŭdis pri Esperanto por la unua fojo en 1951. Tiam mi estis 14-jara mezlerneĵano. Hazarde mi legis la ĉinan tradukon de "Printempo en la Aŭtuno" de Julio Baghy. En la antaŭparolo la tradukinto Bakin detale prezentis la vivon de Baghy kaj menciis Esperanton. Kvar jarojn poste, en 1955, mi legis la ĉinan tradukon de "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat. Ĝi konigis al mi ne nur la noblan personecon de Zamenhof, sed ankaŭ la bazan historion de lia kreaĵo Esperanto. Legante la lastan ĉapitron, mi eklarmis. Min ege kortuŝis lia idealo disvastigi Esperanton por la tuta homaro. Tiu ĉi komuna internacia lingvo tre allogis min. Jam ekde infaneco mi havas grandan inklinon por fremdaj lingvoj, ĉar mi ofte pensis ke ellerni unu fremdan lingvon estas kvazaŭ malfermi unu fenestron al la mondo. Ju pli da lingvoj oni ellernas, des pli da fenestroj oni malfermas, kaj oni konas la mondon pli bone kaj pli klare.

Ĝis januaro de 1956, mi jam lernis 5 eŭropajn lingvojn. Tial, lerni Esperanton ŝajnis al mi ege facile. En malpli ol unu monato mi ellernis Esperanton laŭ la malnova lernolibro de Hujucz kaj komencis skribi esperante unuajn pensojn, aforismojn kaj poemetojn en mia notlibro. Ĝuste en tiu jaro 1956, kiel 19-jara junulo, mi ekverkis versojn en diversaj lingvoj kaj komenciĝis mia E-verkado.

En aprilo de 1957 mi aliĝis al UEA dank' al helpemo de mia onklo Prof. D-ro Edward Su en

Usono, amiko kaj simpatiano de nia lingvo, kiu pagis por mi kotizojn ĉiujare kaj libromendojn.

Post mia aliĝo al UEA, Esperanto fariĝis mia centra studobjekto kaj malfermis al mi novan vojon al internacia amikeco kaj kultura interŝanĝo. Mi ricevis E-gazetojn el pluraj landoj kaj mi avide legadis kaj verkadis poemojn en Esperanto, kies belsonecon kaj taŭgecon por poezikreado mi ege miris.

En 1960, kiel novbakita E-poeto mi debutis en "Norvega Esperantisto" (n-ro 3) per du poemoj, kaj per tio komenciĝis mia literatura aktiveco en mia plej amata lingvo.

Samjare komenciĝis mia fruktodona korespondado kun la plej fama E-verkisto Julio Baghy (1891-1967). La nomo de Baghy estas sufiĉe konata en Ĉinio. Ĉar lia novelo "Printempo en la Aŭtuno" ĉinigitaj jam en 1931 atingis la 16-an eldonon en 1956. Tiu ĉi romano estis tiel bele verkita kaj bone tradukita, ke mi, legante ĝin, ne povis ne elverŝi larmojn pro la disiĝo de la junaj geherooj. En okt. de 1960 mi sendis al Baghy poem-leteron demandante lin, ĉu eblos renkonti la heroinon — la bonkoran kaj belegan Eva-n en la reala vivo, kaj nomante Baghy "Paĉjo". Nur post kelkaj semajnoj venis lia longa respondo kun propramane dediĉita portreto kaj kelkaj poemoj. Li jam konsideris min sia ĉina filo kaj kuraĝigis min verki daŭre en Esperanto. Ĉio ĉi tio jam signifis grandegan honoron por mi! En somero de 1961 li mem eĉ prezentis min kaj deklamis miajn poemojn dum klubves-

pero en Budapeŝto. Fine de 1961, kiel novjara donaco li sendigis al mi sian poemdramon "Sonĝe sub Pomarbo" pere de sia poeto-filino el Anglujo, fama E-poetino F-ino Marjorie Boulton.

Ekde tiam, kiom da intimaj leteroj ni interŝanĝis! Kiom da librodonacoj ŝi faris al mi. Ŝiaj leteroj fariĝis por mi jam nedisigebla parto de mia vivo. Ambaŭ ni estis gefiloj de Baghy kaj mi ame nomis ŝin "Franjo". En 1982 ni festos la 20-jaran jubileon de nia amikeco!

Mi korespondis ankaŭ kun multaj aliaj famaj esp-istoj kaj pioniroj de nia afero de diversaj landoj. Per la korespondado mi celas du: verki en Esperanto por pliriĉigi nian originalan litera-

turon; due, konigi al la verda mondo la ĉinan kulturon, precipe la ĉinan poezion, kaj laŭ brila ekzemplo de Kolomano Kalocsay, traduki esperanten el la monda poezio. Mi amas poezion kaj lingvojn. Mi ekversis ĉinlingve en 1950, 13-jara, kaj lernis entute pli ol 20 lingvojn, el kiuj mi scipovas paroli 6, inkluzive Esperanton kaj povas legi en pluraj aliaj. Per tiu ĉi privilegio mi sukcesis kontakti geamikojn en pli ol 60 landoj kaj amike interparolis kun geamikoj el pli ol 30 landoj.

Kiel ĉino, mi starigis al mi la ĉefan taskon prezenti la ĉinan kulturon al la verda mondo per artikoloj kaj poemoj. Jen: la famaj antikvaj poetoj Qu Yuan, Lu You, Du Fu, komponisto Nie Er, la nacia heroo Zheng Chenggong, la patriota fervoj-inĝeniero Zhan Tianyou ktp. Aliflanke, mi dediĉis grandan tempon al la tradukado esperanten de la ĉina poezio. Mi tradukis el la fama antikva poemaro "300 Poemoj el Tang-dinastio", Su Dongpo kaj Lu You el Song-dinastio kaj el la nuntempa plej fama poeto Zang Kejia, kies unu poemo aperis en "Belarta" de 1961 redaktita de magistro William Auld kaj eldonita de UEA. Tiun numeron mi donacis al la poeto mem ĉe mia vizito en Beijing en nov. de 1965. Li tiel kortuŝiĝis kaj tuj donis al mi la permeson pri esperantigo de ajna lia poemo senkondiĉe kaj skribis en mia memorlibreto jenajn vortojn: "Kamarado Armand Su, faru personan kontribuon al la socialisma konstruado". Cetere, mi verkis surbaze de antikvaj ĉinaj legendoj rakont-poemojn "Liang Sanbo kaj Ĝu Intaj" ktp. por "Monda Kulturo" kaj turismajn artikolojn



*La kovrilo de la unua itallingva poemaro de Armand Su "Poemoj el Ĉinio".*



*Fremdlandaj eldonaĵoj kun artikoloj de Armand Su*




pri la Subtera Palaco de Beijing kaj Longmen-Grotaro ktp. por "Kontakto".

Mi koncentris mian studon en E-poezio. Mi plej ŝatas la poemojn de Baghy, Boulton, Logvin, Piĉ, Urbanova ktp. kaj penis prezenti niajn E-poetojn al nia juna generacio. Mi kreis la rubrikon "Renkontoj kun niaj poetoj" en la sveda junulara revuo "Kvinpinto", en kiu mi prezentis Deŝkin, Clark kaj Thorsen (n-ro 6 de 1962 kaj n-ro 1,2 de 1963) kaj skizis pri Boulton, Baghy, Privat, Jung, Kalocsay, Szilagyi ("La Nordamerika E-Revuo" de 1963-64). Emba ("Oomoto", 11-12 de 1964) ktp. Cetere mi verkis artikolojn pri E-poezio por "La Juna Penso", "Heroldo de Esperanto" ktp.

La verda mondo montris grandan simpation al mi. La hispana "Hejs" kaj la sveda "La Espero" gastigis miajn fotojn sur la kovrilpaĝoj (okt. n-ro de 1962 kaj jan. n-ro de 1963 respektive); je la 5-a de februaro, 1963, Radio Roma disaŭdigis la prelegon pri mi fare de s-ro Luigi Minnaja kaj kune kun s-ino Minnaja deklamis 8 el miaj poemoj; pluraj alilandaj esperantistoj tradukis miajn artikolojn aŭ filmkritikojn (speciale verkitajn por la koncernaj landoj en Esperanto) en naciajn lingvojn. Mi neniam forgesos ilian amikecon kaj helpemon.

Defendi kaj propagandi Esperanton estas devo de ĉiuj veraj esperantistoj, precipe en neesperantistaj rondo. En 1961 mi sendis anglalingvan proponon pri Esperanto por literaturaj konkursoj organizitaj de "World Student News" 6-lingva organo de la Internacia Studenta Unuiĝo. Kvankam la respondo de la redakcio estis nea, tamen mia propono aperis sur la unua paĝo de la n-ro 12 de 1961 kaj akiris eĥojn. Jam en la n-ro 4 de 1962 aperis subtena letero el Usono. Kontraŭ la franca neo-faŝismo persekutanta Esperanton mi publikigis artikolon "Ĉu silenti aŭ agi tuj?" en okt. n-ro de 1962 de organo de SAT-junularo "La Juna Penso". Laŭ invito de D-ro Victor Sadler (nuna direktoro de CO. de UEA) mi verkis "Esperanto kaj la Azia Junularo" por la provnumero de la plej granda internacia junulara revuo en E. "Kontakto" (1964).

1965 estis grava jaro por mia E-aktiveco: mi fariĝis delegito de UEA en Ĉinio kaj konstanta



*Armand Su kaj geesperantistoj de Tianjin*

ĉina kunlaboranto de la belarta gazeto en Esperanto "Monda Kulturo", mi havis la honoron esti vicigita inter la plej grandajn stelojn Baghy, Kalocsay, Boulton, Ragnarsse ktp.; gajnis premion en la Internacia Poezia Konkurso organizita de OOMOTO.

En 1966 mi elektiĝis kiel ĉina komitatano de TEJO, fariĝis ĉina reprezentanto de Esperanto-Muzikasocio Muzilo. En aŭgusto en Japanujo eldoniĝis "Utafesta Poemaro" kun miaj premii-taj poemoj, biografiaj notoj kaj portreto. Fine de 1966 mi ricevis neatendite la plej sincerajn bondezirojn kaj fotodonacon de la aŭstra prezidanto D-ro Franz Jonas. Kia honoro por mi, ke la aŭstra ŝtatestro kaj fama esperantisto montris al mi simpation.

En 1966 min trafis la uragano de la kultura revolucio. Ekde aŭgusto senĉesaj traserĉoj, bruligo de eksterlandaj libroj kaj gazetoj, konfiskado de privataj havaĵoj. Sendi leterojn eksterlanden estis tro danĝere, kaj mankis mono por tio. Sub tia ekstreme malfacila kaj danĝera cirkonstanco mi ankoraŭ persistis en poresperanta laboro. Mi daŭre verkis E-poemojn kaj korespondis.

En 1967 mi fariĝis la unika ĉina E-korespondanto de la Internacia Tribuno de Poezio en Ĝenevo. Mi kreis la Rubrikon de la E-poezio en ĝia plurlingva organo "La Poésie Vivante" kaj faris E-tradukojn el la ĉeĥa poeto D-ro Ondra Lysohorsky por ĝi.

*(Daŭrigota)*



YAN JI:

## ŜAKISTO QI

*Qi Jingxuan*

**E**N novembro de 1978, la nomo de la ĉina ŝakisto Qi Jingxuan skuis la ĉefurbon de Argentino Buenos-Ajreso. En la lokaj ĵurnaloj senĉese aperadis fotoj kaj raportoj pri tiu ĉina junulo.

En la 23-a Olimpika Teama Ŝaka Konkurso okazigita en Argentino, Qi Jingxuan superis grandan majstron de Islando Cigurjonsson kaj egalis grandan majstron de Kubo Gircia. Poste, en la Internacia Roubatala Ŝaka Turniro de Grandaj Majstroj aranĝita de la argentina ĵurnalo "Klariono", li superis sovetunian grandan majstron Vaganian, kuban grandan majstron Quinteros kaj egalis grandajn majstrojn de Usono, Britio, Argentino kaj la Filipinoj. Li ricevis, pro sia eminenta arto en ŝakludo, laŭdojn de diverslandaj ŝakistoj kaj spektatoroj.

Kiel Qi Jingxuan komencis ludi ŝakon? Kiel li kreis sian arton "misteran" en ŝakludo? Ni iom rigardu lian pasintecon.

Iun tagon somermeze de 1961, sur la nigra tabulo ĉe la pordo de la Jingye-a Mezlernejo en Nanshi-kvartalo de Shanghai aperis anonco: "La urba sporta komisiono funkciigos ŝakan kurson en someraj ferioj. Bonvolu sin anonci tiuj, kiuj volas lerni en ĝi."

Lernantoj de la altaj klasoj venis unuj post aliaj al la sporta ĉambro por sin anonci. Inter ili estis ĝentila lernanto de unuajara klaso kun malgranda staturo kaj blanka vizaĝo. Li honteme iris al la tablo kaj skribis sian nomon sur la registra tabelo: Qi Jingxuan.

Ĉar li lertis en ludo de la ĉina ŝako kaj lernis diligente, li fariĝis sufiĉe elstara inter la kursanoj. Tiam famaj ŝakistoj de Shanghai Long Guojun, Xu Tianli kaj aliaj ofte venis al la kurso por direkti ilin en lernado. Qi Jingxuan progresis rapide. En la fino de tiu jaro la 14-jara Qi gajnis la kvaran lokon en la geknaba ŝaka konkurso de Shanghai. Liaj instruistoj kaj samlernejanoj laŭdis lin, ke li ne nur lertis en ŝaka ludo, sed ankaŭ bone plenumis sian lernadon. En 1963, li gajnis la unuan lokon en la matematika konkurso de la tuta lernejo.

Poste, rekomendite de la lernejo li partoprenis en la ŝaka kurso de la Shanghai-a Geknaba Amatora Sporta Lernejo kaj lia ŝakarto multe progresis. En 1964 li unuafoje partoprenis en la tutlanda ŝaka konkurso, superis tiujn ŝakistojn, kiuj gajnis la kvaran kaj kvinan lokojn en la konkurso kaj egalis la gajnintojn de la ĉampioneco kaj subĉampioneco. Kaj pro tio li estis elektita kiel "eminenta ŝakisto". Tiam nemalmultaj opiniis, ke li estas esperiga novulo en ŝaka ludo. Por altigi sian ŝakarton li pli diligente sin trejnadis.

En la jarfino de 1965, kiam la sovetunia ŝaka teamo vizitis Ĉinion, la ŝaka majstro kaj membro de la ĉampioneca teamo en la Monda Studenta Ŝaka Konkurso Sipov superis sinsekve tri eminentajn ŝakistojn de nia lando, kaj poste li rivalis kontraŭ Qi Jingxuan. Estis unuafoje por la 18-jara Qi rivali kontraŭ fremdlanda ŝakisto, kaj la loto decidis, ke Qi ekmovu la dua ŝakpe-



# JINGXUAN



*Qi Jingxuan kaj argentina ŝakisto Quinteros en matĉo*

con. La spektatoroj opiniis, ke li perdos la konkurson. Sed li estis sentima antaŭ la forta rivalo, li manovris lerte kaj aplombe en la ŝaka ludo kaj faris fortajn atakojn. Post pli ol dek pecomovoj sur la ŝaktabulo li trovis la postfronton de sia rivalo ne bone defendata kaj movis siajn ŝakpecojn antaŭen, tiel li regis la tutan situacion. Poste li artifice logis ĉaron de la rivalo en senelirejon per ofero de du peonoj kaj gajnis la venkon.

En 1966 komenciĝis la Granda Kultura Revolucio de Ĉinio. Tiam ĉiuj aktivadoj de ŝaka ludo ĉesis, sed Qi Jingxuan ankoraŭ daŭrigis sian studadon pri ŝako. En 1970 li fariĝis laboristo de la Shanghai-a Fabriko de Konstruaj Maŝinoj. Ĉiutage, en postlaboraj horoj li esploris en- kaj ekster-landajn komentariojn pri ŝakludoj, kaj konsultis librojn tiuflankajn. En 1974 okazis en Chengdu la unua tutlanda ŝaka konkurso post la komenco de la kultura revolucio. Iuj ŝakamantoj opiniis, ke Qi plurjare ne partoprenis en ŝaka konkurso, do li ne povos bone manovri la ŝakpecojn. Sed neatendite, li superis multajn fortulojn kaj gajnis la duan lokon de la konkurso. Kaj en la Tria Tutlanda Sporta Konkurso en la sekvanta jaro li superis ĉiujn ŝakistojn kaj gajnis la ĉampionecon.

En internacia konkurso Qi Jingxuan superis grandan majstron de la Filipinoj Eugenio Torre kaj la eksprezidanton de la Internacia Ŝaka Federacio, antaŭan mondan ŝakan ĉampionon,

grandan majstron de Nederlando Euwe. En la Azia Ŝaka Konkurso de 1977, Qi Jingxuan atingis la plej altan lokon de 2,435 poentoj kaj estis la sola ŝakisto, kiu perdis neniun ludon.

Tamen, estis la Internacia Rondbatala Ŝaka Turniro de Grandaj Majstroj aranĝita de la argentina ĵurnalo "Klariono" en novembro de 1978, kiu vere famigis la nomon de Qi Jingxuan en la internaciaj ŝakaj rondoj. En ĝi partoprenis 12 mondfamaj grandaj majstroj. Qi Jingxuan ne havas titolon, sed estis invitita por partopreni en la turniro, ĉar li antaŭe superis grandajn majstrojn. La matĉo en kiu li superis la sovetunian grandan majstron Vaganian estis la plej ekscita batalo en tiu turniro. Vaganian havas kromnomon de "nevenkebla majstro" kaj konservis rekordon de nevenkebleco en la 23-a Olimpika Ŝaka Konkurso.

En tiu turniro Qi Jingxuan akumulis 5 poentojn. Laŭ la reguloj de internacia konkurso li povus gajni la titolon internacia majstro de ŝako, se nur li gajnus plue 0.5 poenton, t.e. egali rivalon en unu matĉo. Sed en la finetapa rondbatala konkurso, kiam li devis rivali kun izraela granda majstro Roman Dzindzihavili, li forlasis la matĉon pro malsano. Multaj bonkoraj amikoj tre bedaŭris pri tio. Mondfama ŝaka komentariisto Naidorf diris: La fakto, ke Qi venkis plurajn fortulojn fame konatajn en la mondaj ŝakaj rondoj, pruvis, ke li estas juna ŝakisto kun brila perspektivo.

# KIOM DA INFANOJ ŜI HAVAS

(raportajo)

**L**A ĉina fama ginekologo-obstetrikistino Lin Qiaozhi estas hodiaŭ jam 77-jara. Ŝi trapasis jam pli ol 50 jarojn en obstetrikaj ĉambroj. La plej aĝaj el la infanoj, kiuj venis en la mondon per ŝia helpo, jam estas pli ol 50-jaraj kaj eble jam havas nepon. Sed ŝi mem ne fondis sian familion nek havas infanon.

Simile al longa rivero, ŝia vivo de pli ol 70 jaroj trapasis multajn multajn zigzagojn.

## I

Antaŭ 59 jaroj, juna Lin Qiaozhi forlasis sian hejmlokon Gulangyu kun malgranda pakaĵo, kaj

veturis al la malproksima nordo. Ŝi informiĝis antaŭ longe, ke en la antikva urbo Beijing (Pekino) troviĝas domego kun verda tegmento, kie oni povas lerni eminentan kuracan arton. La instruistoj kaj kunlernantoj ĉiuj laŭdis ŝin, ke ŝi havas paron da lertaj manoj, kaj kuraĝigis ŝin tien iri. En tiu tempo, vere kuraĝa decido tio estis por juna knabino.

Ŝi sukcese trapasis la eniran ekzamenon de la Unia Medicina Instituto.

En tiu domaro kun tegmentoj el verde glazuritaj tegoloj funkciis hospitalo kune fondita de pluraj usonaj kristanaj eklezioj. En ĝi iris vere

*Kamaradino Lin Qiaozhi propagandas al junulinoj higienajn sciojn.*





mistera medicino, mistera ĝis kruela malhomeco. Por tiu institucio, ŝajne medicino ne celis servi al la malsanuloj sed la malsanuloj estis nur instrumentoj por medicina esplorado. Inter la studentoj iris intensa konkuro, kiu ne celis bone servi al la socio per kuracarto, sed akiri vivpozicion. Se iu trovis utilan referencan libron, li klopodis por ĝin kaŝi kaj teni ĝin en sekreto. Ŝi, knabino kun kristale klara koro, havis nenian ambician avidon. Malklara volo de liberigo de la virinoj ŝin stimulis, ke ŝi glorigu la virinojn per sia kapableco. Ŝi studis tre diligente kaj fariĝis eminenta studentino en sia klaso. Pasis 8 studaj jaroj, duono de ŝiaj samklasanoj estis forigita pro malsukceso en ekzamenoj, sed ŝi okupis la unuan honoran lokon en la listo de la diplomitoj.

Kiel malfacile estis por knabino trarabati sian vojon! Tamen baldaŭ ŝi rimarkis, ke ŝi devos ankoraŭ strebadi kun plurobla fortostreĉo ol la aliaj por akiri firman starpunkton en la hospitalo.

Tiutempe, en la Unia Hospitalo, troviĝis neniuj virinaj laborpostenoj krom tiu de flegistinoj. Kaj tie oni volis nur fraŭlinojn por tiu laboro, la flegistinoj edziniĝintaj baldaŭ trafis maldungon. Lin Qiaozhi fariĝis prove praktikanta kuracistino, kio estis ja novaĵo en tiu hospitalo. Por tia kuracisto plenumenda estis kroma tasko, nome labori kiel rezidanta deĵoranto en la hospitalo. En la komencaj du jaroj, la ĉefkuracisto malsaniĝis, kaj la respondeculo de la hospitalo diris al ŝi: "Plenumu kumule ankaŭ alian laboron!" Tiel do, ŝi devis plenumi laborojn por tri personoj.

Ĉiutage, ŝi devis kuradi de la kliniko al la malsanulaj ĉambroj kaj de malsanulaj ĉambroj al la operacia ĉambro. Ŝi eĉ ne havis liberan horeton, kaj kiam ŝi prenis vespermanĝon, ŝi devis demeti la bovlon kaj manĝbastonetojn kiam batis la oka, por telefone raportu al la estro la laboron de la tuta tago. Foje, ŝi estis invitita ĉeesti geedziĝan feston. Ŝi demetis la blankan kitelon kaj surmetis novajn vestojn antaŭ spegulo, kaj dum la zorga tualetado ŝi jam imagis al si la ĝojan renkontiĝon kun la geamikoj. Subite eksonoris la telefono, de kiu ŝi ricevis ordonon de la estro

plenumi iun taskon, kaj ŝi devis rezigni ĉeeston de la festo.

Ŝi havas karakteron tute ne strangan kaj ŝi interesiĝis pri ĉio de la vivo. Ŝi havis fortan inklinon al muziko, ŝatis ekskursojn, raviĝis de poemoj de Ŝekspiro kaj emis fari korverŝan interparolon... unuvorte, ĉion, kion ŝatis la ĉinaj intelektaj virinoj de la tridekaj jaroj, ankaŭ ŝi ŝatis. Ŝi estis serena kaj ekstravertita kaj neniam ŝi sin maskis. Sed nun ŝi devis kaŝi sian koron. Ŝanĝiĝis ŝia opinio pri la homa vivo kaj ŝi ne plu opiniis, ke oni povas zorgi samtempe la privatan vivon kaj karieron. La edziniĝintaj virinoj devis porti aldonitan ŝarĝon kaj duobla ŝarĝo povis faligi ilin!

Forpasis jaroj, forpasis ŝia mallonga juneco kiel akvo en rivero, kaj sur ŝia glata vizaĝo aldoniĝis sulkoj. Pro ŝia diligenta laboro kaj eminenta kuracarto, ŝi estis promociita estrino de la ginekologia-obstetrika fakoj. Geamikoj alvenis por ŝin gratuli kaj multaj virinoj en la socio sentis fieron pro ŝi. Kiel enviinde! Ĉu ŝi vere efektiviĝis sian idealon? La idealo, kiu floris en la koro de la naiva knabino dum ŝi transveturis Changjiang-riveron (Jangzi) per balanciĝanta boato, efektiviĝis tiam nur duone. Ŝi akiris profesion por stari en la socio, tamen ŝi perdis la ordinaran vivon de virino. Kiel maljusta estis la sorto!

## II

En tiu tempo, famiĝo de kuracisto signifis liberiĝon de banalaĵoj kaj eblecon akiri grandsumajn honorariojn. Sed ne tiel estis por Lin Qiaozhi, ŝi estis laŭdita pro sia nobleco de kuracisto. Ŝi ne malpuriĝis vivante en koto, kaj ĉiam senlace penlaboradis kaj zorge servadis al la suferantaj malsanuloj, kiel ordinara kuracisto. Fremdlandaj kuracistoj de la Unia Hospitalo ŝin mokis dirante: "Fraŭlino Lin, ĉu vi pensas, ke oni povas meriti la nomon de eminenta specialisto, nur se oni palpas manojn de malsanuloj?"

Sed ŝi ĉiam agis laŭ sia konvinkiĝo: "Ĉu kuracisto, kiu ne scias, ĉu la manoj de lia paciento estas varmaj aŭ malvarmaj, povas esti nomata bona kuracisto!" Ŝi amis sian profesion, amis la akuŝantinojn kaj infanojn.

Iutage, gravediĝinta virino petis helpon de la hospitalo. Ŝi naskis antaŭe kelkajn bebojn, sed neniu el ili restis viva kaj oni ne klare sciis la kaŭzon de ilia morto. Parolante pri siaj malfeliĉaj naskitoj, la virino larmadis maldolĉe. Lin Qiaozhi bone komprenis la patrino: en tiu tempo, seninfaneco ja signifis por virino senrajtecon en sia familio. Ŝi zorge flegadis la pacientino. Naskiĝis al ŝi bela infano, sed ĝi febris kaj ploradis. Ĉiuj eblaj rimedoj estis uzitaj, tamen ĝia sanstato ne boniĝis. Ŝi milde masaĝis la frunton de la infano, tiu ĉi kaptis ŝian fingron per sia maneto kaj kviete endormiĝis. Pro kompatemo ŝi ne fortiris sian fingron kaj restis kaŭrante plurajn horojn ĉe la infano. Flegistinoj vokis ŝin al vespermanĝo kaj deĵoranta kuracisto venis por transpreni ŝian laboron, sed ŝi restis senmove kaj diris mallaŭte: “Se mi ekmoviĝos, la infano vekigis. Nur se li bone dormos, li espereble tenos sian vivon. . .”

Estis alia kazo: iu virino alveninta de alia loko suferis de perturbo de utercervika aperturo kaj oni diagnozis en tiu loko, ke tio estas kazo de kancero. Sed kiam ŝi informiĝis, ke ja juna virino gravediĝis unuafoje, ŝi ekkompatis ŝin. Ŝi decidis riski kaj ne tuj amputi ŝian uteron. Dank’ al ŝia kuracado, naskiĝis grasa knabineto

post kelkaj monatoj kaj ankaŭ malaperis la simptomo ĉe la patrino. La patrino nomis sian filineton Nianlin, kiu signifas “memore al d-rino Lin”.

Ja ne nur Nianlin sola estis savita de ŝi. La konservataj registraj libroj pri akuŝado klare montras per bluaj stampoj la unuajn piedsignetojn de multaj multaj infanoj en ĉi tiu mondo. Plenkreskiĝintaj infanoj ofte skribas al Lin Qiaozhi, vokante ŝin “panjo Lin”.

Legante tiajn leterojn, ŝi sentis ĝojon de patrino. Ŝia koro baniĝis en viva plezuro, kaj ŝi sentis ke la vivo kuracista estas tre riĉa kaj ŝi eĉ tute kontentiĝis pri sia stato! Tiamaniere, ŝi travivis alian turniĝon de sia penso, kaj ŝi ne plu pensis pri edziniĝo. Ĉu tio signifis komedion aŭ tragedion? Neniu juĝis pri tio. Sed baldaŭ poste ŝi trafis alian turniĝon, ŝia miela monato de kuracista vivo estis venenita de la kruela realo!

Eksplodis la Pacifika Milito, la hospitalo estis fermita. Ŝi perdis sian konstantan okupon kaj devis iri en la socion por trovi vivrimedojn.

Beijing sub la fera kalkanumo de la japanaj invadantoj fariĝis tute malluma. Kiam ŝi devis





nokte viziti sian pacienton, neniŭ strata lampo lumigis al ŝi la vojon. Kun sako en mano ŝi tra iris unu post alia malhelajn kaj dezertajn stratojn, frosta vento hurlis super ŝia kapo, fantomaj siluetoj de arboj ŝin timigis, ŝi jam ne havis kuragon iri plu antaŭen. La hejmlando jam duone falis, kaj propra familio ja tute ne ekzistis por ŝi. Ŝi plenis de pensoj, sed al kiu ŝi diru ilin? Ja kiu zorgus pri ŝia vivo? Malsekiĝis ŝiaj okuloj, refoje ŝi sentis ĉagrenon specialan de senhejma virino. Sed en ŝia vaganta penso subite aperis la pacientino kaj ŝia feto, kaj denove rapidiĝis ŝiaj paŝoj . . .

Ŝi eniris malgrandan kvadratan korton ĉirkaŭatan de kabanoj.

Ŝi enpasis malaltan humidan ĉambron. En la malforta flava lumo de kerosena lampo ĝemadis la akuŝantino sur la terlito. Kun blua vizaĝo kaj senbrilaj okuloj, la virino sin trovis en prostracio post baraktado. La amnia fluido jam elfluis, tamen la feto ne eliĝis. La flegantoj ĉe la terlito estis en konfuzo, la tuta familio estis en malespero.

Post ekzameno Lin konstatis, ke la akuŝantino estis en malbonega sanstato: mankis al ŝi medicina helpo dum la graveda periodo, pro prostracio ŝia utero ne povis kuntiriĝi sufiĉe forte. Ŝi tuj donis al ŝi urĝan helpon. . .

Pasis unu sekundo, pasis du sekundoj. . . Ekstere pli kaj pli furioziĝis la vento, kiu skuadis la dometon. Ja veron montras la popola diro, ke por malriĉulino akuŝi signifas vagi ĉirkaŭ sia ĉerko. En noktomezo, finfine naskiĝis la bebo kaj la patrino endormiĝis. La pala lumo

de la kerosena lampo rivelis du vizaĝojn sur la terlito: la roza vizaĝeto de la bebo kaj la iom post iom ruĝiĝanta vizaĝo de la patrino. Viveco revenis al la ĉambreto. Tamen la doktorino tute laciĝis.

La familianoj ne sciis kiamaniere danki la kuracistinon, kaj nur tiam ili ekpensis, ke ŝi certe jam estis tre malsata, kaj tuj komencis prepari manĝon. Sed la kuracisto danke haltigis ilin, prenis malvarman bataton de sur la tablo, ĝin mordis silente kaj flegadis la pacientinon ĝis tagiĝo.

Je ŝia foriro, la familianoj de la pacientino demandis sincere kaj timeme, kiom ili pagu al ŝi kiel honorarion. Ŝi ne respondis, anstataŭe ŝi malfermis sian mansakon, elprenis kelkajn monbiletojn kaj ilin metis sur la tablon.

Ŝi iradis sur la vojo kun peza koro. Ŝi ne povis klarigi al si, kial dum ŝi savis unu post alia multajn malsanulinojn, ankoraŭ pli multaj virinoj tamen baraktas en teruraj suferoj, kial dum ŝi enkondukis multajn amindajn etulojn en la mondon, ankoraŭ pli multaj vivuloj tamen estas forglutitaj de la malluma socio. La kaŭzo kuŝis en politiko, tamen politiko estis tute fremda por ŝi. Ŝi ekmemoris ĉinan antikvan diron: "Se vi ne volas fariĝi bona ĉefministro, do fariĝu bona kuracisto." Ŝi retrorigardis la historion de miloj da jaroj de la patrolando kaj konstatis, ke dum la longaj jaroj vere aperis nemalmultaj bonaj kuracistoj, tamen neniam aperis vere bona ĉefministro. Tial ŝi pensis, ke ŝi devas stari ekster politiko kaj fariĝi vere bona kuracistino.

Kiel ajn ŝanĝiĝis la mondo, ŝi ĉiam teniĝis al tiu ideo, kaj ŝi tiel enpasis nian novan socion. . .

(Daŭrigota)





# “MI ESTAS DUONĈINO”

— Pri generalo J. W. Stilwell kaj liaj filinoj

de JIN FENG

**L**A aviadilo estis ekflugonta. Ni estis baldaŭ forlasontaj Usonon.

Nin, unu post alia, ĉirkaŭprenis kaj adiaŭis Nancy Iaster Brook kaj Alison Stilwell, filinoj de generalo Stilwell, en la atendejo de la aerodromo de San-Francisko. Ni malvolontis disiĝi. Mi rimarkis, ke ruĝiĝis iliaj okuloj.

Tuj kiam ni atingis Usonon, Alison Stilwell venis bonvenigi nin. Tiam ŝi malvarmumis kaj ŝia voĉo estis iom raŭka. Tamen ŝi persiste akompanis nin en nia vizito. Dum ni veturis de Racine ĝis Madison de la Ŝtato Wisconsin, mi sidis kune kun ŝi kaj tial havis ŝancon aŭskulti ŝian rakontadon pri la sentoj de ŝia patro kaj ŝia tuta familio por la ĉina popolo.

Ĝuste kiam okazis la Revolucio de 1911 en Ĉinio, la 27-jara usona oficiro Stilwell unuafoje venis al Ĉinio. En tiu tempo la longhistoria Ĉinio kaj ĝiaj ŝanĝoj jam vekis intereson ĉe Stilwell. En 1919 Vaŝingtono estis preta sendi iujn al Ĉinio por lerni la ĉinan lingvon. Kvantkam Stilwell jam havis la aĝon de 35 jaroj, tamen li ankoraŭ volis lerni la ĉinan lingvon, kiun la okcidentanoj trovis malfacile komprenebla kiel libro el la ĉielo.

En 1920 Stilwell venis al Beijing (Pekino) kun siaj edzino kaj du junaj gefiloj. En 1921 Alison Stil-

well naskiĝis en la Unia Hospitalo de Beijing.

En Ĉinio Stilwell lernis la ĉinan lingvon dum tri jaroj. Li kaj lia familio vivis en Tianjin (Tiangin) de Ĉinio dum la periodo 1926-1929. Tie naskiĝis la plej juna frato de Alison Stilwell. En 1935, li kaj lia familio venis al Beijing la kvaran fojon kaj loĝis en la strateto “Pigo” en la orienta parto de la urbo. Tiujare Alison Stilwell jam atingis la aĝon de 14 jaroj. De sia 15-jara aĝo ŝi komencis lerni la ĉinan pentroarton. Ŝi lernis de la veterana pentristo Pu Xinyu la pentradon de pejzaĝoj kaj homfiguroj, kaj de Yu Fei’an la pentradon de floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj. En la aĝo de 18 jaroj tiu usona knabino jam bone posedis la ĉinan pentrarton, havis certajn atingojn kaj ekspoziciis siajn pentraĵojn.

En 1939 Vaŝingtono telegrafis al Stilwell, ke li revenu al Usono. Sur la ŝipo per kiu Stilwell veturis al Usono, li estis nomumita generalo. Post la Evento de la Perla Haveno, generalo Stilwell ricevis la oficojn de komandoro de la usona armeo de la Milita Zono de Ĉinio, Hindio kaj Birmo, kaj de stabestro de la Milita Zono de Ĉinio. Poste li kvinnafoje venis al Ĉinio kaj laboris kiel milita konsilanto de Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek). Li oponis lian politikon de splitiĝo, regreso kaj aŭtokratio, malamegis la mal-

versacion kaj koruptiĝon de la kuo-mintanga reganta kliko kaj tre simpatiis kun la ĉina popolo. En Chongqing (Ĉongking) li ofte intervidiĝis kun Zhou Enlai, Dong Biwu, Song Qingling kaj aliaj. Jiang Jieshi tre malŝatis lin kaj fine devigis lin forlasi Ĉinion en novembro de 1944. Sed Stilwell profunde sopiris al Ĉinio, kie li vivis sume 13 jarojn. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito li telegrafis al Jiang Jieshi, dezirante veni al Beijing por rigardi, sed tio estis rifuzita. Nelonge poste, la usona registaro helpis Jiang Jieshi per mono kaj municio en lia interna milito. Tio vekis koleregon ĉe generalo Stilwell. Li, sincera amiko de la ĉina popolo, mortis pro hepata kancero en novembro de 1946. Antaŭ sia morto li ankoraŭ pensis pri Ĉinio kaj diris al siaj edzino kaj gefiloj: “Mi esperas, ke estonte vi, anstataŭ mi, revizitos Ĉinion.” En 1947 la edzino de Stilwell aperigis la taglibron de generalo Stilwell. Laŭ la volo de Stilwell, sur la paĝo por dediĉo de la libro presiĝis lia aŭtografio “Saluton al Song Qingling” kiel donaco al la ĉina popolo. Sed dum tiu tempo estis barita la interkomunikiĝo inter la ĉina kaj usona popoloj. Nur en 1973, kiam Alison Stilwell venis en Ĉinion, la libro atingis la manon de Song Qingling, vicprezidentino de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio.



Alison Stilwell, kiu naskiĝis kaj vivis en Ĉinio sume 10 jarojn, neniam forgesis tiun landon. Ŝi sopiris al siaj instruistoj kaj geamikoj en Beijing, sopiris al la amata maljuna servistino kaj eĉ griloj, kiuj estis ĉirpantaj en la malnovaj loĝdomoj ĉe la strateto "Pigo", kaj kies sonora ĉirpado estis ŝvebanta kvazaŭ ĉiam ĉe ŝiaj oreloj. Pro tio ŝi prenis plumon kaj verkis la libron "Griloj—la Oraj Sonoriletoj" ilustritan per ĉinstilaj pentraĵoj, kiu estis publikigita en San-Francisko. En aŭtuno de 1945 en San-Francisko okazis kunveno por fondi la Organizon de Unuiĝintaj Nacioj, kiun ĉeestis kamarado Dong Biwu. Li speciale invitis Alison Stilwell al festeno kaj donis al ŝi kunveno-vizitan paperon de UNO. Ŝi ĉiam bone konservis la invitan karton, la vizitan paperon por kunvenoj de UNO kaj la tabelon de tagordo. En 1973, kiam ŝi venis al Ĉinio, ŝi donacis ilin kiel valoran memorigaĵon al la muzeo de Meiyuan Xincun de Nanjing (Nankino).

La baro inter la ĉina kaj usona popoloj multe ĉagrenis la tutan familion de generalo Stilwell. Tiam la nigraj nuboj de la leĝ-projekto de McCarthy estis super Usono, kaj Ĉinio fariĝis preskaŭ tabua regiono. En tiaj cirkonstancoj Alison Stilwell ankoraŭ ĉiutage faris ĉinstilajn pentraĵojn kaj ankaŭ lernigis al multaj aliaj usonanoj la ĉinan pentroarton. Ŝi konigis al ili, kiel ĉarma estas la ĉina kulturo kaj kiel aminda estas la ĉina popolo. Ja sufiĉe da kuraĝo ŝi devis havi por tion fari tiutempe. Pere de tiuj pentraĵoj multaj usonanoj konis Ĉinion kaj ne plu kredis la mensogojn en la ĵurnaloj. Pere de tiuj pentraĵoj multaj usonanoj, kiel Alison Stilwell, atendis remalfermon de la vojo al Ĉinio.

Fine venis tiu tago. En 1972 estis publikigita la Shanghai-a Komuniko kun historia signifo. En 1973 Alison Stilwell kaj aliaj 14 usonaj virinoj venis al Ĉinio.

Ŝi ĝoje vidis, ke Ĉinio multe ŝanĝiĝis. En ŝia memoro Tian'an-



*Jin Feng kaj Alison Stilwell (la dekstra)*

*Ĉinstilaj pentraĵoj faritaj de Alison Stilwell*



men estis mizera pordego kaj strategoj de Beijing estis plenaj de malriĉuloj almozetantaj, kiuj havis nek loĝejon nek laboron. Ŝi ankoraŭ memoris, ke la maljuna instruisto, kiu instruis al ŝia patro la ĉinan lingvon, fariĝis senlaborulo post kiam ŝia patro revenis la hejmlandon. Kiam ŝia patro refoje venis al Ĉinio, li loĝigis tiun maljunan instruiston en sia hejmo, por ke la lasta instruisto al liaj filinoj la ĉinan lingvon. Malfeliĉe la maljunulo mortis poste pro malsano. Tiam ŝi kaj ŝia fratino ploris ĉagrene pro la bonkora avo . . . Kun miro ŝi vidis nun, ke Tian'anmen-pordego ore brilas kaj la pompaj Popola Halo kaj Historia Muzeo staras sur la grandioza Tian'anmen-placo. Ŝi vidis, ke la vivo kaj laboro de la ĉina popolo estas garantiataj kaj la kampoj kaj arboj estas plaĉe verdaj. Ĉinio, kiun ŝi vidis, estis pli aminda ol tiu, kiu restis en ŝia memoro.

En Beijing ŝi vizitis la Unian Hospitalon, nun la Ĉefurban Hospitalon, kie ŝi eĉ trovis sian naskiĝateston. Kiam ŝi intervidiĝis kun kamaradino Deng Yingchao, ŝi ne povis reteni sian ĝojon, dirante: "Mi estas duonĉino, mi naskiĝis en Ĉinio." Ŝi fotis la naskiĝateston kaj kunportis la foton al Usono kiel plej valoran memorigaĵon.

En 1976 la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj speciale invitis Alison Stilwell kaj ŝian plej aĝan fratinton al Ĉinio. Ili vizitis Xi'an (Hi'an), Nanjing (Nankinon), Shanghai (Ŝanhajon), Hangzhou (Hangĝou) kaj Guilin (Gujlin). Estante pentristino, Alison Stilwell aparte ŝatis la pejzaĝojn de Guilin. Ŝi klare memoris, ke en ŝia infaneco ŝia patro pentris por ŝi malgrandan bildon pri pejzaĝo de Guilin. Hodiaŭ kiam ŝi vere eniris en la bildon, ŝi estis tute ekster si de ĝojo. Ŝi kaj ŝia plej aĝa fratino restadis en Beijing ses

semajnojn, dum kiuj ŝi faris multajn ĉinstilajn pentraĵojn. Nun tiel multaj homoj volas havigi al si ŝiajn pentraĵojn ke ŝi jam ne povas kontentigi ilian bezonon. En la lastaj 5 jaroj ŝi pentris preskaŭ 400 ĉinstilajn pentraĵojn.

Por plej bone rememori sian patron, Alison Stilwell kaj Nancy Iaster Brook kune kun siaj edzoj kaj plej aĝaj filinoj venis al Ĉinio ĝuste je la naskiĝtago de generalo Stilwell, la 19-a de marto ĉi-jare. Ili vizitis Guangzhou (Kantonon), Nanjing, Shanghai, Suzhou (Sugou), Wuxi (Vuhi), Yixing (Jihing), Zhengzhou (Gengĝou), Xi'an kaj Chongqing (Ĉongking) kaj vojaĝis laŭflue de Changjiang (Jangzi-rivero) por rigardi la Tri Montgorĝojn de la nomita rivero. La belaj montoj kaj riveroj de Ĉinio multe larĝigis la vidkampon de Alison Stilwell kaj pliriĉigis ŝiajn pentraĵojn. Ŝia edzo ĝoje diris al ŝi: "Ni revenos en 1981 kaj kunportos niajn filineton kaj filon." Nun ili jam komencis prepari vojaĝmonon kaj havas apartan deponon sub la nomo "Mono por vojaĝi al Ĉinio". Ankaŭ iliaj infanoj kalkulas kaj atendas la tagon, en kiu ili vojaĝos al Ĉinio. La amikeco de la maljuna generacio daŭris jam ĝis la juna generacio. La ĉina kaj usona popoloj amike kunvivis de generacio al generacio.



EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ


## LA DRAKBOAT

**ĈIUJARE**, de la 24-a ĝis la 27-a de la kvina monato laŭ la luna kalendaro de Ĉinio (t. e. la lasta tagdeko de junio) okazas la Drakboata Festo de la mjaŭ-a popolo, kiu koncentre loĝas ĉe Qingshui-rivero de Guizhou-provinco. Mi speciale veturis al Shidong pli ol mil kilometrojn fora kaj ĝoje pasigis tiun tradician feston kune kun la lokanoj.

Shidong estas urbeto tuj apud la rivero Qingshui en la gubernio Taijiang de la Mjaŭ-a kaj Dung-a Aŭtonoma Subprovinco de Sudorienta Guizhou-provinco, kaj tie funkcias la loka registaro. La kvartaga aktivado de la festo iris en kelkaj mjaŭ-aj vilaĝoj kun tiu urbeto kiel la centro.

La 24-an, mi kaj aliaj pli ol 50 ĵurnalistoj kaj instruistoj de artaj institutoj, kiuj iris por fari pentraĵojn kaj kolekti kantojn de la mjaŭoj, navigadis kontraŭflue en du motorboatoj al la vilaĝo Pingzhai en malproksimeco de 15 kilometroj, ĉar tie oni inaŭguros la feston.





## ESTO SUR QINGSHUI-RIVERO

de XIAO XUESHENG

Qingshui estas relative granda rivero en tiu provinco. Ĝi fluas orienten en la fame konatan lagon Dongting de la najbara provinco Hunan. La lokanoj diris, ke la akvo de la rivero kutime estas tute klara. En tiu tago ĝi iom malklariĝis pro ĵusa pluvado. Sed la montoj sur la bordoj aspektis pli verdaj kaj pli belaj.

En tiu pitoreska loko cirkulas jena legendo:

Antaŭ longe, ĉe la bordo loĝis diligenta kaj kuraĝa mjaŭ-a junulo nomata Bao. En la kvina monato de iu jaro Bao finis sian transplantadon de rizidoj kaj iris fiŝkapti en boato sur la rivero kune kun sia sola filo en libertempo. Kiam la boato trapasis profundejon sub rokego, subite malaperis la infano. Bao tuj plonĝis en la akvon por ĝin serĉi. Li trovis, sur la riverfundo, grandan kavernon, en kiu malica drako firme tenis lian karan filon jam senspiran. Evidente, lia infano jam ne estis ĝia unua viktimo. Bao eksplodis de indigno kaj ekbruligis

la kavernon. Ruliĝanta fumo vulalis la riveron dum naŭ tagoj kaj naŭ noktoj. La rizidoj preskaŭ velkis.

Ĝuste tiam grupo da infanoj ludis surborde. Ili faris malgrandan floson el tri artemiziaj tigoj kaj movis ĝin en la akvo, ludante perkutmuzikilojn. Je tio la fumo iom post iom disiĝis kaj la blua ĉielo denove aperis. Tiam alfloris sur la rivero la brulmortigita giganta drako, kaj oni tranĉis ĝin en kelkajn pecojn kaj disdonis ilin al la proksimaj vilaĝoj.

Depost tiam, en la lasta tagdeko de la kvina monato ĉiujare, kiam la mjaŭ-a popolo jam plenumis transplantadon de rizidoj, ili faris drakboatojn laŭ la formo de la artemizia flosoj kaj okazigis konkurson por celebri la venkon super la malica drako kaj preĝi por abunda rikolto.

Tiu legendo spegulas la belan idealon de la mjaŭ-a popolo en la jaroj, kiam homoj ne havis forton

venki malicajn fortojn kaj la naturon.

Post la Liberiĝo, la mjaŭ-a popolo fariĝis mastro de Qingshui-rivero kaj komencis ĝin reformi per la kolektiva forto. En la oficejo de la loka registaro pendas sur muro mapo de akvomastroma plano. K-do Pan, sekretario de la partia komitato de la loko, diris, ke en 1965 ili konstruis malgrandan akvokonservejon Yangjiagou kaj irigaciadis per ĝia akvo 67 hektarojn da rizkampoj dum 72 tagoj en la sekega jaro 1972. Poste, sub helpo de la subprovinca registaro ili konstruis aliajn du akvokonservejojn. En la lasta jaro la supera registaro alsendis teknikistojn por fari prospektoradon kaj projekton de ilia kvara akvokonservejo. Hodiaŭ la Drakboata Festo jam fariĝis festivalo de la popolo por sin amuzi anstataŭ preĝi por riĉa rikolto.

Laŭ la legendo, Pingzhai siatempe ricevis la kapon de la drako, tial la festo devis komenciĝi en la vilaĝo. Kiam ni atingis ĝin, la plaĝoj de la



*Vizitu la konkurson.*



*Kantanta knabino  
de Mjaŭ-nacieco*

rivero kaj la deklivoj de la monto jam estis plenaj de bruaj homamasoj. Tien venis ne nur gejunuloj kaj gemaljunuloj de la mjaŭ-a nacieco loĝantaj en la ĉirkaŭaĵo de kelkdek kilometroj, sed ankaŭ tiuj de la han-a nacieco, kiuj vivas en harmonio kun la mjaŭ-aj gefratoj de generacio al generacio. Antaŭ ol la drakboatoj atingis la lokon, standoj en unu vico altiris al si multajn homojn. Tie estis vendataj freŝaj fruktoj, etmanĝaĵoj kaj ĉiutagaj vivezonajoj. Antaŭ ĉiu stando staris multaj klientoj. Sed la plej okulfrapaj estis la mjaŭ-aj knabinoj en festaj vestoj. Tage ili rigardis la remkonkurson kaj nokte rendezvis kun mjaŭ-aj junuloj.

Subite aŭdiĝis de fore tri pafoj. Tuj vigliĝis la homoj, kaj geknaboj galopis konkure al la bordo por bonvenigi la unuan drakboaton.

La boato kun longeco de pli ol 30 metroj estis farita el tri firme kunligitaj trogitaj arbotrunkoj, el kiuj la plej longa en la mezo estas



nomata patrinoboato kaj la aliaj ĉe ambaŭ flankoj filoboatoj. La pruo alte sin levis super la akvo kaj estis ornamita per delikate skulptita drakokapo lakita en ruĝa, flava, verda, blanka, nigra, blua kaj ora koloroj. La boato impresis per imponeco kaj beleco. Ĉe la pruo staris viro kun longa bambua stango en la mano kaj antikva fusilo sur la dorso. Estis ĝuste li, kiu ĵus anoncis la komenciĝon de la konkurso. Post li sidis tamburisto kaj gongisto. La tamburisto estis ĉefkomandanto de la boato, kaj tiun rolon kutime plenumas aĝulo de la vilaĝo. Li sin vestis en antikva mjaŭ-a blanka robo kaj ruĝa silka veŝto kun nigraj pasamentoj kaj portis pajlan ĉapelon larĝrandan sur la kapo kaj arĝentan ringegon ĉirkaŭ la kolo. La gongisto estis knabo en virina vesto. Sur la filoboatoj staris po 16 remistoj. Ili estis bravaj kaj fortikaj junuloj kun lerte plektita pinta ĉapelo sur la kapo, en bruna jaketo kaj blua pantalono, kaj kun larĝa bunta silka zono ĉe la talio. Sur la pobo staris mezaĝulo, sperta kaj aplomba, videble bona stiristo. Sur la boato estis pli ol 40 personoj inkluzive kelkajn remistojn en rezervo.


La boato alboridiĝis en bruo de petardoj. La boatanojn renkontis amikoj kaj parencoj. Ili pendigis vivantajn kokojn, anasojn kaj anserojn sur la drakkapon kaj prezentis al ili dolĉan arakon mempreparitan, kantante tostokanton por kune celebri la feston kaj esprimi bondeziron pri riĉa rikolto.

Post momento venis sinsekve ok drakboatoj de la najbaraj vilaĝoj. Ili ĉiuj faris konkurson duope. Sub urĝa tamburado kaj gongado la remistoj starante remadis en sama takto kaj la boato sin pafis antaŭen kiel sago en la torento. La atmosfero vere streĉis la koron de spektantoj.

La kulmino de la festo estas kutime en la dua tago. Tiutage la kunvenejo translokiĝis en la vilaĝon Tanglong je 0.5 km for de Shidong. Tie la rivero estas larĝa, kaj la plaĝo vasta kaj ebena, tial la loko estas ne nur bona konkursejo de boatoj, sed ankaŭ taŭga tereno por bovluktado, ĉevalrajdado kaj aliaj aktivadoj. Oni diris, ke sur la rivero foje kolektiĝis 44 drakboatoj, kaj sur ambaŭ bordoj estis 30,000-40,000 spektantoj. Imageblaj estis la grandiozezo de la spektaklo kaj la entuziasmeco de la amasoj. Sed ĉi-jare malbela vetero ĝenis la festantojn: Nokte falis pluvego kaj la ŝvelanta rivero inun-

dis la plaĝon, tial multaj aktivadoj devis esti nuligitaj. Tamen mi havis ŝancon rigardi tre interesan aktivadon.

Post falo de la nokta vualo, ĉie, tiel ĉe la vilaĝoj kiel sur stratoj, jen kaj jen brilis poŝlampoj, aŭdiĝis belaj mjaŭ-aj kantoj. Ĉe tio komenciĝis kunveno de gejunuloj: Paro kaj paro da gejunuloj kantis unu al la alia por esprimi sian amon al la nova vivo kaj sian lojalecon al la amo. En profunda nokto denove ekpluvegis. Ni gastoj rapide revenis al la hotelo. Mi pensis, ke la renkontiĝo certe finiĝis, tamen ne. Kantoj enflugis tra la fenestroj de tempo al tempo, eĉ ĝis la tagiĝo.



*Konkurso de drakboatoj*





*Panoramo de la kavernaro Yungang*

de WENWEN

**E**N Yungang, 16 kilometrojn for de la urbo Datong, sin trovas ŝtona kavernaro farita en Norda Wei-dinastio antaŭ 1,500 jaroj. Ĝi konsistas el 53 ĉefaj kavernoj kun pli ol 51,000 versimilaj ŝtonaj budhaj statuoj, reliefaj flugantaj diinoj kaj figuroj el religiaj rakontoj. Tiuj skulptaĵoj allogas al si vizitantojn kaj turistojn en- kaj eksterlandajn.

Laŭ kroniko, Datong iam estis ĉefurbo de Norda Wei-dinastio. Tiam budhismo ekfloris en Ĉinio. Por narkoti la popolon, Norda Wei-dinastio, domaĝante nek laborfortojn nek monon, sendis dekmilojn da diversnaciecaj metiistoj al la monto Wuzhou, kie ili laboris en frostego kaj varmegego por konstrui

la ŝtonan kavernaron de Yungang. La grandiozeco de la kavernaro, la pompeco kaj eleganteco de ĝiaj skulptaĵoj plene manifestis la saĝon de la antikvaj laborantaj popolanoj de Ĉinio, kaj elokvente montris la veron, ke la historio estas kreita de la sklavoj. La ŝtona kavernaro de Yungang kiel kultura restaĵo estas ne nur unu el la elitoj de la ŝtona skulpturo de Ĉinio, sed ankaŭ vaste konata internacie kiel "trezorejo de ŝtona skulpturo".

Antaŭ ses jaroj ĉefministro Zhou Enlai akompanis la eksprezidanton de Francio Georges Pompidou viziti la nomitan kavernaron. Dum la vizitado li rimarkis, ke sur iuj valoraj ŝtonaj skulptaĵoj aperis fendoj,

kaj instrukciis al koncernaj unuoj severe plifortigi protektadon al la kavernaro. Ĉe sia foriro li diris al ĉeestantaj ĵurnalistoj ĉinaj kaj fremdlandaj: "Ni nepre klopodos por bone konservi la kavernaron de Yungang." "Bonvole vizitu ĝin refoje post tri jaroj." Nun jam realiĝis la deziro de kamarado Zhou Enlai. La riparado de la kavernaro jam finiĝis laŭplane. Aplikante novan teknologion, specialistoj kaj laboristoj firme kungluis pecigitajn partojn de skulptaĵoj kaj ankaŭ la danĝeraj ŝtonoj kaj fendigitaj rokmuroj estis riparitaj.

Antaŭ nelonge mi veturis de la urbo Datong al la kavernaro de Yungang. Atinginte la lokon, mi



vidis, ke ŝtonaj kavernoj grandaj kaj malgrandaj viciĝas unu apud alia sur la suda kruta rokmuro de la monto Wuzhou kaj longas unu kilometron de oriento ĝis okcidento. La konstruado de la nomita kaverno estis komencita en la kvina jarcento p. K. kaj dank' al plua konstruado en la dinastioj Sui, Tang, Liao kaj Jin ĝi havas la nunan skalon. Ĝi estis ekkonstruita malpli frue ol la fame konataj kavernoj de Dunhuang je unu jarcento, tamen je pli ol 90 jaroj pli frue ol la fama ŝtona kaverno Longmen de Luoyang, kaj ĝi estas pli grandskala ol la lasta.

Enirinte en la kaverton n-ro 5, mi vidis sidantan budho-statuon altan je 17 metroj kaj larĝan je 15.8 metroj. Ĝiaj piedoj longas 4.6 metrojn kaj la meza fingro de la manoj 2.3 metrojn. Rigardante tiel altan kaj grandan ŝtonan statuon, mi estis ravita de la talento de la antikvaj skulptistoj. Poste mi vidis alian subĉielan budho-statuon 13 metrojn altan, kiu estas multe admirata kaj fotita de fremdlandaj gastoj. Tiu statuo karakteriziĝas per grandaj okuloj, rekta nazo, maldikaj lipoj, diketa vizaĝo kaj larĝaj kaj dikaj ŝultroj. Ĝi montris la altan plastikan arton kaj talenton de tiamaĵ skulptistoj. Poste mi ankaŭ trovis vivecan malgrandan budho-statuon kun alteco de nur 2 centimetroj. Kelkajn paŝojn de tiu eta statuo estas budhismo-garda dio, kvinkapa kaj sesbraka, rajdanta sur pavo, kiu impresis min per braveco

La kaverno de Ŝakjamunio estas rigardata kiel la centro de la nomita kaverno. Ĝi altas je 23 metroj kaj larĝas je 17 metroj kaj estas dividita en du etaĝojn. La plejparto de ĝiaj statuoj kaj reliefoj konservas originalan stilon de antikva religia arto. Sub la niĉoj de la supera etaĝo troviĝas reliefaj bildoj pri la juna Ŝakjamunio sin amuzanta en

la reĝa palaco kaj pri lia forlaso de la palaco sur ĉevalo en nokto. La bildoj kun komplika strukturo tiel klare esprimas la temon, ke aprecante ilin, vizitantoj kvazaŭ sin trovas en la reĝa palaco de Ŝakjamunio en la sesa jarcento p.K. Dum vizitado mi ankaŭ trovis, ke la kapoj de iuj budho-statuoj estis forhakitaj kaj iuj ŝtonaj niĉoj estis komplete forŝtelitaj. Tio estas signoj postlasitaj de avidaj reakciaj regantoj kaj imperiismaj ŝtelistoj, vere indignigaj!


La grandioza trezorejo de ŝtona skulpturo Yungang ja estas frukto de pena laboro de ĉinaj antikvaj lertaj metiistoj. Ĝi liveris valoran materialon por studo de la politiko, ekonomio, kulturo, arto kaj religia kredo en antikva Ĉinio. Tie mi renkontis belartiston el Shanghai. Li estis ravita de la multnombraj statuoj, flugantaj diinoj kaj reliefoj de pavilonoj kaj aliaj belaj konstruaĵoj sur rokmuroj. Sub lia gvido mi rimarkis, ke iuj ŝajne similaj budho-statuoj efektive diferencas inter si per tute malsamaj sintenoj. Sur iu rokmuro skulptiĝis statuoj de ses belulinoj kaj muzikistinoj ŝvebantaj ĉirkaŭe en la aero, el kiuj iu tenas ĉinan bambuan fluton, alia ludas ĉinan ok-truan fluton kaj tria ludas liuton. Ja estas vere malfacile priskribi ilian graciecon. Tiuj skulptaĵoj estas ne nur valoraj por belartistoj kaj arkeologoj en studo de budhisma arto, sed ankaŭ rara materialo por esplori muzikon de antikva Ĉinio. La reliefoj pri muzikistinoj montris, ke frue antaŭ 1,500 jaroj muzikaj instrumentoj, muziko kaj dancarto de Ĉinio jam atingis rimarkinde altan nivelon. Krome, la ĉizitaj surskribaĵoj tieaj sur ŝtonpecoj servas kiel materialo por esplori la historion de skulptado de la ŝtona kaverno de Yungang. La okangulaj kolonoj kaj plafono en la kaverno n-ro 9 ankaŭ



*La ĉefa budho en la 20-a kaverno kaj statuoj en niĉoj*



*Kapo de budho en niĉo sur la norda muro en la antaŭa ĉambro de la 5-a kaverno*




*Statuoj en niĉoj super la 20-a kaverno*

estas materialo por studi arkitekturon de la antikva Ĉinio.

Inter la skulptaĵoj de la kaverno iuj altaj budho-statuoj estis faritaj laŭ imperiestroj de Norda Wei-dinastio kiel modelo. La “alteco” de la budho-statuoj simbolas “dignecon” de la imperiestroj, dum la “afabla vizaĝo” servas por mistifiki kaj sklavigi la popolanojn. Sed la historio evoluis ne laŭ ilia deziro.

La vizito al la riparita kaverno estigis grandan emocion al mi kaj multe pensigis min. Ambaŭflanke de la vojo al la kaverno kreskas altaj kaj rektaj pinoj kaj cipresoj. Krom apliki rimedojn kontraŭ humideco, vento kaj pluvo, laborantoj de la Administracio de Kulturaj

*Provizistinoj kaj muzikantoj sur la supra parto de la frontono de la suda muro en la posta ĉambro de la 7-a kaverno*





Objektoj pavimigis la vojon per brikoj, konstruigis pavilonojn kaj koridorojn kun balustradoj por beligi la medion kaj havigi al la vizitantoj oportunajn ripozejojn. Kun la disvolviĝo de la turisma afero de Ĉinio, la kavernaro de Yungang ĉijare akceptos fremdlandajn amikojn multe pli ol en la pasinta jaro.

Iu kunvojaĝanto diris al mi, ke sub la kavernaro troviĝas karbo. Por protekti tiun ĉi antikvan artan restaĵon, la ŝtato malpermesas ekspluatadon.

Sur la revena vojo la intima kaj konata voĉo kvazaŭ refoje sonus ĉe miaj oreloj: “Ni nepre klopodos por bone konservi la kavernaron de Yungang.” “Bonvole vizitu ĝin refoje post tri jaroj.”

*Provizistino sur la supra parto de la kolono en la posta ĉambro de la 6-a kaverno*





S-ro Nino Pala, instruisto de unuagrada lernejo de Cagliari de la itala insulo Sardinio, kaj liaj gelernantoj sendis surbendigitan leteron al Li Shih-Chun de nia redakcio. En tiu letero li diris, ke nun en la nomita lernejo funkcias 4 Esperantaj klasoj kaj oni intencas instrui Esperanton al 6 klasoj en la venonta lernjaro 1979-1980. Por ricevi freŝajn informojn, la gelernantoj elmetis 21 demandojn en la dirita letero kaj petis respondon surbendigitan kaj skribitan. La diritaj demandoj kredeble povas interesi ankaŭ niajn legantojn, tial ni publikigas ilin kaj nian respondon, krom sendi surbendigitan leteron al la italaj geamiketoj.

— La Redakcio

Karaj geamikoj,

Mi estas lernantino de elementa lernejo de Cagliari ("Kaljaro" laŭ la Poŝatlaso de la Mondo), la ĉefurbo de Sardinio, Italujo.

En la nomo de miaj samklasanoj, mi salutas vin, kaj esperas ke, kvankam malproksimaj, ni povos baldaŭ interamikiĝi.

Ni ĉiuj deziras, pere de Esperanto, aŭdi la voĉojn de homoj el diversaj partoj de la mondo.

Ni estas geknaboj 11-12-jaraj kaj vizitadas la kvinan klason: la lastan klason de la elementa lernejo. Inter niaj stud-objektoj estas geografio, kompreneble. Ĝis lastjare ni studis la regionojn de nia lando, Italujo. Ĉijare ni interesiĝas ankaŭ pri la aliaj landoj de Eŭropo kaj de la aliaj kontinentoj.

Jen, do, nia peto: ĉu vi volas respondi, voĉe, al niaj demandoj: Tiel vi, ne nur aŭdigos al ni vian voĉon, sed samtempe vi donos al ni infor-

mojn kaj freŝajn sciigojn pri vi kaj via lando.

Ni sendas al vi du kasetojn:

—unu, tiu-ĉi kun niaj voĉoj estas donaco por vi;

—la dua, malplena, bonvolu resendi al ni kun viaj respondoj.

Jen, do, la demandoj, kiujn, laŭvice, ni faras al vi:

1. En nia insulo, Sardinio, la vetero estas milda, precipe en la sudo. Kia estas la vetero ĉe vi?

2. Kiujn lingvojn oni parolas en via lando?

3. Kiom da horoj de leciono faras la infanoj en la unuagrada lernejo? Kiom da ferioj en unu jaro? Ĉu ili manĝas en la lernejo?

4. Ĝis kioma jar-aĝo estas devige vizitadi la lernejon?

5. Ĉu la infanoj kolektive vizitadas marajn aŭ montarajn restadejojn dum la lernejoj ferioj?

6. Ĉu la handikapitaj infanoj (kriplaj, mens-debilaj, aŭ iel malfavorataj de sorto) vizitadas la normalajn lernejojn, aŭ ili vizitadas specialajn lernejojn;

7. Ĉu viaj familioj havas kutime multajn infanojn;

8. Ĉu la publikaj servoj bone funkcias;

9. Ĉu en viaj urboj estas multaj parkoj kaj ĝardenoj kun ekipaĵoj por la ludoj de la infanoj?


10. Ĉu en via lando multaj virinoj laboras eksterdome;

11. Kiam la virinoj iras labori eksterdome, kiu zorgas pri la infanoj?


12. Ĉu la hospitaloj estas sufiĉe nombraj kaj bone ekipitaj por kuraci ĉiujn malsanulojn?

13. Ĉu la maljunuloj loĝas kutime kun siaj familianoj, aŭ en specialaj maljunulejoj?

*Geknaboj de Beijing en la Unua de Junio*



*Geknaboj en someraj ferioj*





14. Ĉu okazas multaj krimoj en via lando? El kiu speco? Ĉu tero-  
rismo estas grava problemo ĉe vi?

15. Kion oni kutime manĝas ĉe  
vi, kaj kiuj estas viaj specialaĵoj?

16. Ĉu la radio-televidaj stacioj  
estas nur ŝtataj, aŭ ekzistas ankaŭ  
privataj send-stacioj?

17. Ĉu en la televido oni faras  
multe da komerca propagando?

18. Ĉu ĉiu familio posedas pro-  
pran domon?

19. Ĉu multaj homoj posedas aŭ-  
tomobilon? Ĉu multaj havas tele-  
fonon?

20. Ĉu futbalo estas multe disvas-  
tigita en via lando?

21. Ĉu vi volas paroli al ni pri  
io ajn, kio, laŭ vi, povas interesi  
scivolemajn geknabojn, kiaj ni es-  
tas?

Estimata s-ro Nino Pala,  
Karaj geamiketoj,

Kun ĝojo ni ricevis vian leteron.  
Dank' al la internacia lingvo Es-  
peranto interligiĝas niaj du antikvaj  
popoloj en Eŭropo kaj Azio dividi-  
taj de tre tre longa distanco. Ni  
volonte respondos al viaj demandoj  
kaj esperas, ke kreskados la ami-  
keco kaj interkompreno inter ni.  
Ĉi-sube estas niaj respondoj al viaj  
demandoj:

1. Kvankam nia urbo Beijing  
(Pekino) kaj via urbo Cagliari tro-  
viĝas preskaŭ je la sama norda la-  
titado, tamen la meznombra tem-  
peraturo de Beijing estas 12 gradoj  
C, dum la plej malalta temperaturo  
estas 20 gradoj sub nulo kaj la plej  
alta temperaturo estas 40 gradoj C.

2. Ĉinio estas lando kun multaj  
naciecoj, kiuj parolas diversajn  
lingvojn. La hanoj estas la plej  
multnombraj kaj ili konsistigas  
94% de la 900 milionoj da popo-  
lanoj. La hana lingvo estas ĝene-  
rale uzata, sed ankaŭ la aliaj na-  
ciecoj havas la rajton uzi siajn pro-  
prajn lingvojn.

3. La lernoperiodo de elementa  
lernejo estas 5 jaroj. La geknaboj  
lernas 5-6 horojn ĉiutage. Ili havas  
unu-monatan libertempon en vin-  
tro kaj 45-tagan libertempon en so-  
mero. Ĉar la geknaboj de nia  
lando ĝenerale vizitas lernejon  
proksiman, tial ili povas manĝi  
hejme. En montregionoj, kie la ler-  
nantoj devas viziti iom malproksi-  
man lernejon, ili povas kunporti  
tagmanĝon.

4. La ĉinaj geknaboj ekvizitas ler-  
nejon en sia 6-7-jara aĝo. Kaj nun-  
tempe, deviga eduko de elementa  
lernejo estas ĝeneraligata en la kam-  
paro, dum eduko de mezlernejo  
estas ĝeneraligata en la urboj.

5. En somero, la ŝtato aranĝas  
someran kampadon por la gelernan-  
toj, dum kiu ili povas fari aktiva-  
dojn pri aviado, navigado, radio,  
astronomio, geologio, belarto, muzi-  
ko kaj literaturo. Krome, ankaŭ la  
Geknabaj Domoj kaj Stacioj por  
Eksterlernejaj Aktivadoj aranĝas  
kolektivajn kulturajn kaj amuzajn  
aktivadojn de lernantoj en la so-  
mera kaj vintra libertempoj.

6. En Beijing troviĝas 4 lernejoj  
por surdmutaj infanoj kaj unu ler-  
nejo por blindaj infanoj. Ankaŭ en  
aliaj urboj troviĝas apartaj lernejoj  
por surdmutaj infanoj.

7. Ĉinio praktikas naskolimigon  
kaj la familioj en la urboj havas  
ĝenerale po unu aŭ du infanojn.


8. Post la fondo de la nova Ĉinio,  
la ŝtato starigis multajn publikajn  
servojn. Tamen ili ankoraŭ ne po-  
vas plene kontentigi la bezonon de  
la popolo. Nun nia registaro estas  
plifortiganta la konstruadon de tiaj  
servoj.

9. En parkoj ĝenerale troviĝas  
apartaj ludejoj por infanoj, kie ili  
povas sin amuzi per balancilo, to-  
bogano, karuselo, lulĉevalo k.s. En  
iuj urboj troviĝas ankaŭ specialaj  
kinejoj kaj teatroj por infanoj. Kaj  
la kinejoj kaj teatroj en diversaj  
lokoj ofte donas apartajn prezenta-  
dojn por ili. En nia urbo troviĝas  
multaj belaj parkoj kaj ĝardenoj, al  
kiuj ofte ekskursas la gelernantoj  
sub gvido de siaj instruistoj.

10. En nia lando, la virinoj estas  
egalrajtaj al la viroj kaj multaj el  
ili okupiĝas per sociaj laboroj. Ĉir-  
kaŭ duono de niaj oficistoj kaj la-  
boristoj estas virinoj.

11. Kiam virinoj eliras labori,  
iliaj infanoj ĝenerale estas prizorga-  
taj de infanĝardenoj kaj infanvar-  
tejoj fonditaj de koncernaj insti-  
tucioj kaj kvartalaj komitatoj. Mul-

*Knaboj ŝatas piedpilkadon.*



*Ĉinaj virinoj  
en laborado*



taj fabrikoj havas apartan servon por prizorgi mamsuĉajn bebojn.

12. En 1949, t. e. la jaro de la liberigo de Ĉinio, nia lando havis nur 2,600 hospitalojn kun 80,000 malsanulaj litoj, sed en 1978 ĝi jam havas 64,421 hospitalojn kun 1,856, 391 malsanulaj litoj. Tamen ili ankoraŭ ne povas plene kontentigi la bezonojn de la popolo. La laborantoj de la institucioj kaj entreprenoj ĝuas senpagan sanprotektadon, dum la komunumanoj en la kamparo havas sian kolektivan kuracan sistemon, nome pagi certan kotizon ĉiujare kaj ĝui tute senpagan aŭ parte pagatan kuracadon.

13. La ĉinoj havas sian bonan tradicion vivteni la gepatrojn maljunajn, tial la maljunuloj ĝenerale vivas kune kun siaj gefiloj sub ilia zorgo. Senidaj maljunuloj en iuj urboj kaj vilaĝoj povas senpage vivadi en maljunula domo, kaj tie kie ne estas tia servo, ili povas ricevi senpage grenon, vestojn, loĝejon, medicinan helpon kaj prizorgon de la samlokanoj.

14. En edukado, Ĉinio prizorgas samtempe disvolvi la geknabojn en moralo, intelekto kaj fiziko kaj dank' al kuna klopodado de la lernejoj, familioj kaj socio por ilin eduki, nur malmultaj el ili faris krimojn. Por eduki la junajn krimulojn, en iuj lokoj fondiĝis laborigaj lernejoj kiuj klopodas por transformi ilin, ĉefe per edukado, en homojn utilajn al la socio.

15. La ĉinaj manĝaĵoj estas tre diversaj laŭ la lokoj, ekzemple la norduloj kutimas manĝi farunajn manĝaĵojn, dum la suduloj rizon. La ĉina gastronomio estas diferenca de tiu de Eŭropo; tre multespecaj estas la ĉinaj pladoj kaj multaj lokoj havas siajn apartajn pladojn. Ekzemple, rostita anaso, pri kio ni raportis en n-ro 8 de El Popola

Ĉinio ĉijare, estas unu el la ĉinaj specialaj manĝaĵoj.

16. Ĉiuj televidaj stacioj en nia lando estas establitaj de la ŝtato. La televidaj programoj konsistas el novaĵoj, teatraĵoj, filmoj, muziko, folkloraj artaĵoj kaj sporto. Krome, oni prezentas ĉiutage ankaŭ eksterlandajn novaĵojn kaj rigardindajn lokojn de la mondo.

17. Nun en la televidaj programoj de Beijing oni ne prezentas komercajn anoncojn.

18. La ĉinaj civitanoj povas havi sian propran domon aŭ lui domon. En la urboj, plejparto de la oficistoj kaj laboristoj luas loĝejojn de la ŝtato, dum la kamparanoj ĝenerale havas sian propran domon. En iuj lokoj, produktaj brigadoj konstruigis domojn por sia kolektivo kaj ilin ludonas al la komunumanoj.

19. Ĉinio estas disvolviĝanta lando, tial malmultaj havas sian propran aŭtomobilon aŭ telefonon. Se oni bezonas tiajn instrumentojn pro laboro, la ŝtato povas disponigi tion al ili. Komunaj trafikiloj kiel aŭtobusoj kaj trolebusoj estas ĝenerale uzataj, kaj krome multaj uzas biciklon, kiu estas sufiĉe grava trafikilo en Ĉinio.

20. Piedpilka ludo estas ŝatata en ĉiuj ĉinaj mezgradaj kaj elementaj lernejoj.

21. En multaj ĉinaj urboj troviĝas palacoj kaj domoj, libertempaj sportaj lernejoj kaj stacioj de eksterlerneja aktivado por geknaboj, en kiuj la geknaboj povas partopreni en diversaj aktivadoj. Kredeble ankaŭ vi interesiĝas pri similaj aktivadoj, ĉu ne?

Ni finas la leteron kun sinceraĵo bondeziroj kaj esperas ke ĝi atingos vin en ĝusta tempo.



## ALIA KONSTRUO POR ELEKTRIZI FERVOJON KOMENCIĜIS

Komenciĝis konstruo por elektrizi la parton de Tianshui ĝis Lanzhou de la Fervojo Lianyungang-Lanzhou-a. Post finiĝo de la konstruo duobligos la transporta povo de tiu parto de la fervojo.

La parto Tianshui-Lanzhou-a kun longeco de 354 kilometroj estas la plej okcidenta parto de la Fervojo Lianyungang-Lanzhou-a. Ĝi estas plejparte en montaro, trapasas rapide leviĝantajn deklivojn kaj havas multajn tunelojn, pontojn kaj kulvertojn. Post kiam ĝi malfermiĝis al trafiko ĝi portas pezan taskon de transportado.

La konstruo iras relative rapide sen interrompo de la normala transportado.

## ĈINIO EMISIIS ORAJN MONEROJN

La Ĉina Popola Banko emisiis kompletan de kvar oraj moneroj por memori la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

La fronta surfaco de la moneroj portas la nacian emblemon de la Ĉina Popola Respubliko kaj la dorsa surfaco portas respektive de-



segnojn de Tian-anmen-pordego, la Monumento de la Popolaj Herooj, la Popola Halo kaj Memorhalo de Prezidanto Mao Zedong.

Ili estas la unuaj memoraj oraj moneroj emisiitaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio kaj vendataj en kaj ekster la lando.

## ĈINIO MALFERMIS PLIAN INTERNACIAN AERLINION KAJ URĜAN FLUGHAVENON

Ĉinio aktive disvolvas internacian aeron transportadon. Por kiel eble plej multe mallongigi la flugan tempon kaj ŝpari oleon, kaj por la oportuneco kaj sekureco de la pasaĝeroj, Ĉinio jam decidis malfermi internacian aerlinion de Xianggang (Hongkong) ĝis la landlimo inter Ĉinio kaj Birmo tra Guangzhou (Kantono), Kunming kaj Lincang kaj samtempe malfermis la flughavenon Baiyun de Guangzhou kiel

*La oraj moneroj*



urĝan surteriĝan flughavenon por diverslandaj aeroplanoj venintaj al Xianggang.

Respondeculo de la Xianggang-a oficejo de la Ĉina Civila Aviada Kompanio diris, ke se la Ĉina Aviada Kompanio de Taiwan petos uzi tiun linion kaj la flughavenon, ĝi ricevos permeson.

## ĈINIO KONSTRUOS ALT-ENERGIAN FIZIKAN EKSPERIMENTAN CENTRON


La unua alt-energia fizika eksperimenta centro de Ĉinio estos konstruita proksime de Beijing (Pekino), kaj esplorado kaj preparado por konstruado de la unua 50-gigaelektronvolta protona sinkrotrono jam plene komenciĝis.

La decido pri konstruo de la alt-energia fizika eksperimenta centro kaj la sinkrotrono estas proklamita en la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita en marto de 1978. Dank' al klopodado de pli ol 500 sciencistoj kaj teknikistoj en unu jaro, la projektado de la nomita sinkrotrono jam plenumiĝis.


Ĉirkaŭ 100 fabrikoj kaj sciencaj institucioj partoprenis en studado kaj farado de partoj kaj materialoj de la sinkrotrono. Nun pli ol 200 specoj de metalaj materialoj jam estas sukcese elfaritaj laŭdate, 0.75-megaelektronvolta antaŭinjektilo ekmuntita kaj la alt-frekvenca maŝino jam komencis produktiĝi.

## POR REDUKTI KAJ FORIGI MALPURIGON AL SONGHUA-RIVERO

Ambaŭborde de Songhua-rivero, unu el la gravaj riveroj de nord-orienta Ĉinio, sin trovas 13 grandaj fabrikoj, kiuj komencis, antaŭ unu



*Provfarado de la unua modela magneto de akcelilo*




*Nove farita prova ĉambro de linia akcelilo. La malsupra foto montras ĝian internajon.*

jaro, alpreni rimedojn por malhelpi malpuran akvon entenantan fenolon, cianon, hidrargon, kromon k. a. flui en la riveron. Tiuj 13 fabrikoj estas parto de la 61 entreprenoj, kiuj devas redukti kaj forigi sian malpurigon al la rivero en certa templimo.

La nomita rivero kun totala longeco de 1,840 kilometroj havas dekojn da branĉoj kaj trapasas la provincojn Jilin kaj Heilongjiang. En ĝia baseno troviĝas pluraj gravaj industriaj urboj de nia lando.

En la pasinta jaro, la medioprojektaj fakoj de la du provincoj organizis koncernajn altlernejojn kaj sciencajn instituciojn por fari en-



*Ekspozicio de Japanaj Modernaj Pentraĵoj en Ĉinio*

keton pri malpurigo de Songhua-rivero kaj ĝia damaĝo al sano de homoj, agrikulturo kaj akvaj vivestajoj kaj per tio liveris donitaĵojn por bridi kaj elimini malpurigon al la rivero.

### **TRI ĈINAJ PENTRISTOJ AKIRIS PREMIOJN DE NOMA**

Tri ĉinaj pentristoj akiris premiojn de Noma de 1978 pro siaj ilustraĵoj por tri infanaj libroj donitajn de la Azia Kultura Centro de Unesko. La premidona ceremonio okazis en la Palaca Hotelo de Tokio en Japanio, je la 4-a de julio.

La ĉina pentristo Dai Dunbang akiris la duagradan premion pro siaj ilustraĵoj por "Chen Sheng kaj Wu Guang" kaj la aliaj du ĉinaj pentristoj Gao Made kaj Chen Qiucao akiris "Premion de la Azia Kultura Centro" pro ilustraĵoj por "Sun Vukong Trifoje Batis Skeletospiriton" kaj "Ranidoj Serĉas Sian Patrion" respektive.

### **MALGRANDAJ HIDROELEKTREJOJ EN RAPIDA KONSTRUADO**

Nun pli ol 1,500 gubernioj, kiuj konsistigas tri kvaronojn de la gu-

bernioj de Ĉinio, havas sian propran hidroelektrejon, kaj en 113 gubernioj la totala generatora kapacito superis 10,000 kilovatojn.

Ĝis la fino de aprilo de la kuranta jaro la totala generatora kapacito de la malgrandaj hidroelektrejoj de la tuta lando atingis 5,300,000 kilovatojn, nome je 900,000 kilovatoj pli multe ol la totala generatora kapacito de la tuta lando en 1957.

Antaŭ la Liberiĝo, en Tibeto kun areo de pli ol 1,200,000 kvadrataj kilometroj estis nur unu malgranda hidroelektrejo en Lhasa, kun kapacito de 12 kilovatoj speciale servanta al Potala-palaco. Nun en la tuta aŭtonoma regiono troviĝas pli ol 500 malgrandaj hidroelektrejoj, dank' al kiuj iuj produktaj brigadoj ekuzis malkaran elektron kaj iuj komunumoj kaj gubernioj fondis malgrandajn fabrikojn.

### **REKOMENCIĜIS LA ELDONADO DE LA LIBRARO "FLIRTAS LA RUĜA FLAGO"**

Lastatempe rekomenciĝis la eldonado de la libraro "Flirtas la Ruĝa Flago" redaktita de la Ĉina Junulara Eldonejo. Nun jam aperis la 17-a volumo de la libraro — la unua volumo post la rekomenciĝo de la eldonado.

En la nova volumo estas artikoloj pri Zhou Enlai (Ĝoŭ Enlaj), Zhu De (Ĝu De), Dong Biwu kaj Peng Dehuai.

"Flirtas la Ruĝa Flago" estas libraro en kiu oni speciale aperigas rememoraĵojn pri la ĉina revolucio kaj biografiojn de revoluciaj martiroj. Ĝi komencis eldoni en 1957 kaj de tiam aperis 16 volumoj de ĝi kun centoj da revoluciaj rememoraĵoj kaj revoluciaj historiaj

notoj. Ĝi estas varme akceptata de la legantoj, precipe de junuloj.

### **EKSPOZICIO DE PENTRAĴOJ DE INFANOJ**

Ĉi-somere en Chengdu okazis ekspozicio de pentraĵoj de infanoj de Sichuan, en kiu montriĝas pli ol 300 pentraĵoj de hanaj, tibetanaĵoj, huj-aj, ji-aj kaj manĉuraj infanoj. La plej aĝa pentristo estas 14-jara kaj la plej juna nur tri-kaj-duonjara.

La ekspoziciitaj verkoj inkluzivas paŝtelojn, akvarelojn, lignogravuraĵojn, ĉinstilajn pentraĵojn k. a., kiuj spegulas vivon, idealojn kaj interesojn de infanoj en malsamaj flankoj.

De 1975 Sichuan-provinco okazis ĉiujare tian ekspozicion, en kiu montriĝis pli ol 2,300 verkoj de pli ol 1,600 infanoj. Nombro da verkoj el ili estis elektita por partopreni en la tutlanda ekspozicio de infanaj pentraĵoj.

### **EKSPOZICIO DE JAPANAJ MODERNAJ PENTRAĴOJ EN BEIJING**

La nomita ekspozicio okazis en Beijing en julio de la kuranta jaro, en kiu montriĝis elstaraj verkoj de diversaj skoloj en la lasta duonjarcento. Plejparto de la ekspoziciitaj verkoj estis olepentraĵoj kaj lignogravuraĵoj, kiuj spegulis karakterizaĵojn de la japana pentrarto kaj reaperigis la japanan tradician arton. "Senvostaj Simioj", "Koko", "Sovaĝaj Bovoj" k.a. estas kompareblaj kun samtitolaj verkoj de veteranaĵoj pentristoj kaj aliaj atingis senprecedencan nivelon en la historio



de la japana pentrarto. La pejzaĝoj "Montoj kaj Blanka Nubo" de Higaŝijama Kaiji, "La Malpermesita Urbeto" de Nakane Hiroŝi k.a. estas eminentaj verkoj pentritaj dum ilia vojaĝo al Ĉinio.


### SHANGHAI KAJ MILANO FARIĜIS FRATINAJ URBOJ

La itala urbo Milano kaj la ĉina urbo Shanghai (Ŝanhajo) fariĝis fratinaĵoj. Por tio Milano okazigis solenan ceremonion je la 25-a de junio. La solenon ĉeestis estro de la Shanghai-a Revolucia Komitato Peng Chong, kiu estis vizitanta Italio. En la ceremonio prezidanto de la Itala-Ĉina Asocio de Ekonomia kaj Kultura Interŝanĝo Vittorio Colombo diris, ke la interligiĝo de Milano kaj Shanghai kiel fratinaĵoj akcelos la disvolviĝon de amika rilato inter la du landoj.

### MONUMENTO DE ABE NAKAMARO

La monumento de la pioniro de la ĉina kaj japana kultura interŝanĝo Abe Nakamaro estis inaŭgurita en Hingqing-parko de Xi-an je la unua de julio.

Abe Nakamaro naskiĝis en Nara de Japanio en 698 p.K. En la jaro 717 li venis al Ĉinio kiel studento sendita de Japanio kaj eklernis en Chang-an (nun Xi-an). Post la diplomitiĝo li fariĝis ŝtatoficisto de Tang-dinastio kaj alinomis sin Chao Heng. Li estis amiko de la fame konataj poetoj Li Bai, Wang Wei k.a. kaj mortis en Chang-an en 770. Por memori lin pro lia sindediĉo al la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio, oni starigis monumentojn al li en Xi-an kaj Nara.



### ĜOJINDA DECIDO

La Ĉina Esperanto-Delegacio, partopreninta en la 64-a Universala Kongreso de Esperanto, oficiale transdonis al UEA petskribon de la Ĉina Esperanto-Ligo pri aliĝo al UEA. La decido estis farita en la tria sesio de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL kurantaj. Ĝi havas gravan signifon por pluaparte fortigi la kunlaboron de la Ĉina Esperanto-Ligo kun UEA kaj akceli la amikecon inter la esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

### AMIKA RENKONTIĜO

La 18-an de julio, Zhang Qicheng, membro de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj respondeculo de EPC donis en Beijing simplan bankedon por regali Emil Boasson, peranton de nia gazeto en Islando, kiu venis kiel turisto, kaj Ragnar, islandan studenton en Beijing-universitato. La bankedon ĉeestis ankaŭ esperantistoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, EPC kaj la esperanta sekcio de Guozi Shudian. Ili interparolis intime kaj amike.

La 20-an de julio, membroj de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo Zhang Qicheng, Qiu Ji kaj Yie Junjian intervidiĝis en Beijing kun samideano Daniel Cane, la dua sekretario de la ambasado de Aŭstralio en Ĉinio, kaj aranĝis bankedon por lin regali. Ili esprimis la komunan deziron pri

fortigo de la amikeco inter la esperantistoj de la du landoj.

### FONDIĜO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ

La nomita asocio fondiĝis en Moskvo la 14-an de marto, kies prezidanto estas sinjoro Mahomet Isaev.

### ESPERANTO — PONTOLINGVO

S-ro Takahaŝi Tacuji, kiel membro de la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj EPC-amikoj, vizitis Ĉinion en aŭgusto de la lasta jaro. Reveninte al Japanio, li kaj aliaj membroj de la grupo multe raportis sian impreson pri la vojaĝo kaj rolo de Esperanto en amikeco kaj interkompreniĝo inter la ĉina kaj japana popoloj. En aprilo de la kuranta jaro, li skribis leteron, pere de la Redakcio de EPC, al la Hongkou-a Geknaba Domo de Shanghai por interŝanĝi geknabajn pentraĵojn inter la urboj Shanghai kaj Otaru sub iniciato de s-ro Yamaga, ĉefo de la Otaru Esperanto-Asocio. Dank' al Esperanto jam realiĝis la interŝanĝo. La Hongkou-a Geknaba Domo sendis al Otaru 8 pentraĵojn de ĉinaj infanoj, kaj ili estos montritaj en ekspozicieto de tiu urbo. Esperanto ludas aktivan rolon en la kultura interŝanĝo, tial oni diris, ke ĝi estas pontolingvo.

### LAŬDINDA KUNLABORO

En junio de la lasta jaro s-ino I. Plazotta vizitis Ĉinion. Dum sia restado en Beijing (Pekino) ŝi intervidiĝis kun esperantistoj-laborantoj de la Esperanto-sekcio de Radio

Pekino. Ĝi estas bona kunlaborantino de la Esperanto-Redakcio de ORF. Post sia reveno al Aŭstrio ŝi verkis artikolon pri sia vojaĝo en Ĉinio, kaj oni ĝin disaŭdigis en Esperanta programero de ORF. Ekde tiam la Esperanto-sekcio de Radio Pekino kaj la Esperanta Redakcio de ORF ofte interŝanĝas sonbendojn kaj Esp-novaĵojn.

Laŭ la propono de Guozi Shudian, la nomita redakcio prezentis al la aŭstra aŭskultantaro la nomon de nia peranto s-ro Zeopold Patek kaj la gazeton "El Popola Ĉinio", en marto de 1979. Ni sincere dankas la samideanojn de la Esp. Red., s-inon I. Plazotta kaj nian peranton Zeopold Patek. Ni esperas, ke nia amikeco kaj kunlaboro fortiĝos pli kaj pli en la estonteco.

### "MONDA KULTURO" PRI ESPERANTO

La ĉina revuo "Monda Kulturo", kiun tre ŝatas legi la ĉina popolo kaj kies distribua kvanto superis 300,000, publikigis en la 13-a numero kurantjare artikolon "Pri Esperanto kaj Esperanta Laboro" de Zhang Qicheng, respondeculo de EPC kaj membro de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo. La artikolo dividiĝas en kvar partojn, nome Bezono de Internacia Lingvo, Naskiĝo kaj Evoluado de Esperanto, Esperanto en Ĉinio, Aktiva Subteno de Kamarado Chen Yi.

La duonmonata revuo "Monda Kulturo" konigas al la ĉinaj legantoj sciojn pri la mondo. Ĝi estis kreita en la jaro 1934 kaj ĝia iniciatoro estas Hujucz, veterano de la ĉinaj kulturaj rondoj kaj nun vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Kvina Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj pre-

zidanto de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo.

### LA UNUA KUNVENO DE ESPERANTISTOJ EN TIANJIN

La 24-an de junio, la esperatistoj en la urbo Tianjin unuafoje kunvenis ĉe la Popola Biblioteko. Ili diskutis pri la nuna situacio en kaj ekster la lando, pri la grava signifo de disvastigo de Esperanto, kaj pri starigo de esperanta organizo kaj esperanta kurso.

### BALDAŭ FONDIĜOS ESPERANTO-ASOCIO DE LA URBO CHENGDU

Preparo por starigo de Esperanto-Asocio de Chengdu estas farata de

Liu Hongkang, vicestro de la Financa kaj Ekonomia Instituto de Sichuan-provinco, Lu Jianbo, profesoro de la historia fakultato de la Sichuan-a Universitato kaj Ning Shouren, instruisto de la fremdlingva fakultato de la universitato.

### FONDIĜIS LA SOCIETO POR AMIKECO JAPANA-ĈINA PER KORESPONDADO

En marto de la kuranta jaro estis fondita, en Tokio, la Societo por Korespondado kun Ĉinio. La nomo poste ŝanĝiĝis je la Societo por Amikeco Japana-Ĉina per Korespondado, kies prezidanto estas fama japana literaturisto kaj delegito de UEA, s-ro Kurisu Kei. Oni povas korespondi esperante, angle, ĉine aŭ japane. Oni petu korespondantojn ĉe la prezidanto: S-ro Kurisu Kei, Mogusa Danti 154-1004, Hino-si, Tokio-to, 191 Japanujo.

*Gesperantistoj de Tianjin*






# Nova fizionomio en la malsupra baseno de Huanghe-rivero


Huanghe-rivero (Flava Rivero) estas la dua granda rivero de Ĉinio. Ĝi longas je 5,464 kilometroj kaj trapasas naŭ provincojn kaj regionojn. Ĝia malsupra baseno longa je pli ol 800 kilometroj sin trovas en Shandong-provinco. Ĉar tiu parto fluas rapide kaj entenas grandan kvanton da sablo, tial ĝi ofte breĉiĝis kaj kaŭzis inundon en sia malsupra baseno. Laŭ historia noto, en la pasintaj pli ol 2,000 jaroj ĝi breĉiĝis pli ol 1,500 fojojn kaj ŝanĝis sian fluejon 26 fojojn. En la lastaj ĉ. 100 jaroj ĝi breĉiĝis 149 fojojn en Shandong kaj per tio ĝi alportis profundan suferon al la tieaj popolanoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la laboro por ordigi la riveron eniris en la novan etapon. En la lastaj tridek jaroj, krom plifirmigo de la riverdigoj, oni konstruis 146 kluzojn, sifonajn konstruaĵojn, pumpstaciojn k.a., reformis per ĝia sedimentaĵo 80,000 hektarojn da agro, plimultigis la areon de irigaciataj kampoj ĝis 700,000 hektaroj kaj turnis 130,000 hektarojn da salalkala tero ambaŭborde de la rivero en fekundajn kampojn. La popolo de Shandong, kiu multe suferis de la rivero en la historio, atingis rimarkindan sukceson en grandskala ordigo de Huanghe-rivero kaj ekspluatado kaj utiligo de ĝia akva riĉaĵo.

Akvokluzo, kiu ĉiusekunde povas ellasi 2,350 kubmetrojn da akvo



Sifonaj tuboj



Elektra pumpstacio, kiu povas konduki 18 kubmetrojn da akvo ĉiusekunde kaj irigacii 20,700 hektarojn da agro

Rizkampoj





Ŝtona digo



Kluzo, kiu ĉiusekunde povas ellasi  
1,530 kubmetrojn da akvo




Bona paŝtejo formita el sedimentaĵo de Huanghe-rivero

Pomoĝardeno en la loko kie  
la digo de Huanghe-rivero  
ofte breĉiĝis antaŭe



Antaŭe marĉejo, nun rizkampoj





FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ

Pejzaĝoj de la vilaĝo "Stave"  
de la komunumo "Mettet" de  
Belgio (la vilaĝo kuŝas 30 km  
sudokcidente de Namur)  
de Andre Pierard



# Ceramikaj skulptaĵoj




Bodhidharma

Antaŭ pli ol 1,000 jaroj la urbeto Shivan de Guangdong-provinco en suda Ĉinio jam komencis produkti ceramikojn kaj iom post iom ĝi disvolvigis en produktejon de originalaj ceramikoj. Nun ĝiaj produktaĵoj atingis pli ol 1,500 specojn, inkluzive de homaj kaj animalaj figuroj, diversaj ujoj kaj artefari-taj pejzaĝoj en potoj.

Ceramikaj metiistoj de Shivan tre atentis la spiritan aspekton kaj diversajn vivajn pozojn de homoj kaj animaloj en sia modlado.



Sur la Silka Vojo






# de Shiwan

Zhong Kui



Longviva Feo




# Ŝtona Kavernaro

## Yungang


La nomita ŝtona kavernaro sin trovas en rókmuŝo de la monto Wuzhou, 16 kilometrojn for de la urbo Datong de Shanxi-provinco de Ĉinio. Ĝi estis konstruita en la meza periodo de Norda Wei-dinastio antaŭ pli ol 1,500 jaroj kaj etendiĝas de oriento al okcidento ĉ. 1 kilometron. Nun ĝi konsistas el 53 kavernoj kun pli ol 51,000 statuoj. Ĝi estas unu el la grandiozaj antikvaj ŝtonaj kavernaroj de artaj skulptaĵoj en Ĉinio, kaj ankaŭ unu el la plej valoraj heredaĵoj de budhisma arto de la mondo.

Granda nombro da budhaj statuoj kaj ŝtonaj pagodoj, ŝtonaj kolonoj, multaj niĉoj, komplikaj kaj belaj reliefoj, kaj ankaŭ la preĝejoj, scenejoj, palacoj kaj altaj koridoroj konstruitaj ĉirkaŭ la kavernoj montras antikvajn arkitekturon kaj civilizacion de Ĉinio.




“Flugantaj diinoj” sur la plafono de la kaverno n-ro 12  
Fotitaĵ de Dong Ronggui


Ĉefa statuo de budho en la kaverno n-ro 20








La okcidenta muro de la kaverno n-ro 13



Giganta budha statuo kaj bodisatvo en la kaverno n-ro 3

Niĉoj en la okcidenta muro de la antaŭĉambro de la kaverno n-ro 10



87020

